

V-19034 / 1980

EL POPOLA ĈINIO


Nr. 257

中國報通

2

1980





Ĉefministro Hua Guofeng vizitas la aeromotoran fabrikon Rolls Royce en Derby.



Ĉefministro Hua Guofeng vizitas la faman Reĝan Muzeon en Venecio.

Ĉefministro Hua Guofeng en la pitoreska Venecio fama pro siaj kanaloj.



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Infano Foto de WU FUQIANG

BILDPAĜOJ:

1. KOLORA SERIO
Vizito de ĉefministro Hua
Guofeng al kvar landoj de
okcidenta Eŭropo
2. NIGRA-BLANKA SERIO
Fotografiaj verkoj
3. KOLORA SERIO
La Montpinto Bogda
4. NIGRA-BLANKA SERIO
(1) Skulptaĵo
Foto de ZHU ZUDE
(2) En parko
5. KOLORA SERIO
(1) Fotografiaj verkoj de es-
perantistoj
(2) Ŝtona Kaverno Maiji-
shan
(3) Poŝtmarkoj de la nova
Ĉinio

SUR LA DORSKOVRILO:

Rozoj Foto de XIE FENG

—◆—
Ĝenerala distribuanto: Esperanta
Sekcio de GUOZI SHUDIAN
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Enhavo

La 15-jara jubileo de Esperanto en Radio Pekino	2
ESP-NOVAĴOJ	4, 8
NIA KULTIVEJO: Okaze de nia vojaĝo en Ĉinio	5
Pri la nombro de la mondaj loĝantoj	9
Ĉinio bridas kreskon de sia loĝantaro	11
Pri la naskolimigo en Shifang	13
Grandioza kunveno de ĉinaj literaturaj kaj artaj rondoj	17
Pri la altigo de la prezoj de agrikulturaj produktoj aĉetataj de la ŝtato	21
INTER NI: El leteroj de niaj legantoj	23
Grava afero por la ĉinaj sportistoj	24
VIDINDAJ LOKOJ: La montaro Tianshan	25
Vizito al Beijing-a Poŝtmarka Presejo	28
AMIKECO: Memorinda operacio	31
Kiel mi edukis miajn infanojn?	33
KARIKATURO	35
Elekto de la Perlo (Daŭrigo)	36
TRA ĈINIO: Havenurbo Ningbo en konstruado	39
HISTORIAJ OBJEKTOJ: La kaverno de Maijishan-monto	42
KALEJDOSKOPO	44
KURANTAJ AFEROJ	45
KULTURAJ NOTOJ	47

La 15—jara jubileo de Esperanto en Radio Pekino



(De maldekstre) Cicio Mar, Qiu Ji, Ĵelezo, Chen Yuan kaj Ĉ. Ĉen

Kantado en Esperanto



ĜIS la 19-a de decembro de 1979 la Esperanta voĉo sonis en Radio Pekino jam 15 jarojn. La Esperanta Sekcio de Radio Pekino okazigis kunsidon por celebri la 15-jaran jubileon de la Esperanto-disaŭdigo.

La kunsidon ĉeestis vicprezidanto de ĈEL Ye Laishi (Ĵelezo), ĝenerala sekretario de ĈEL Chen Yuan, membro de la Konstanta Konsilantaro de ĈEL kaj ĉefa respondeculo de EPC Zhang Qicheng (Ĉ. Ĉen), membroj de la Konstanta Konsilantaro de ĈEL Qiu Ji kaj Ye Junjian (Cicio Mar) kaj reprezentantoj de la Beijing-aj esperantistoj. Ĉiuj ĉeestantoj esprimis varman gratulon al la kamaradoj de la Esperanta Sekcio de Radio Pekino.

Okaze de la jubileo ankaŭ Hujucz, membro de la Konstanta Komitato de la Popola Kongreso, vicprezidanto de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj prezidanto de ĈEL, kiu ne povis ĉeesti la kunvenon, faris sonbendan paroladon.

En la kunsido Ye Laishi faris paroladon en la nomo de ĈEL, Chen Yuan donis gratulajn vortojn kaj ankaŭ Zhang Qicheng, Qiu Ji, Ye Junjian, Tikos kaj aliaj kamaradoj esprimis varman

gratulon al la kamaradoj de la Esperanta Sekcio.


La paroladoj de la maljunaj esperantistoj multe kuraĝigis la junajn esperantistojn de la Esperanta Sekcio, kaj la lastaj es-

primis ke ili nepre klopodos por plibonigi la Esperanto-disaŭdigon kaj multe kontribui al disvastigo de Esperanto kaj plifortigo de interkompreno kaj amikeco inter esperantistoj de

diversaj landoj kaj la ĉina popolo.

En la varma atmosfero iuj esperantistoj voĉlegis sian poemon kaj aliaj kantis esperantajn kantojn.

Gratula Parolado de K-do Hujucz



Hujucz

Karaj gekamaradoj de Esperanto-Sekcio de Radio Pekino,


Okaze de la 15-jara jubileo de Esperanto en Radio Pekino, mi varme gratulas vin. Mi estas ege ĝoja, ke vi faris bonan laboron por la ĉina popolo kaj la monda esperantistaro. La voĉo de Radio Pekino en Esperanto, kvazaŭ kukolo, vokas onin diligente semi amikecon inter ĉiuj popoloj de la mondo. Hodiaŭ sur la verda kampo de Esperanto prospere floradas floroj de amikeco. Ni, ĉinaj esperantistoj devas ankoraŭ pli energie labori. La ĉina Esperanto-movado havas gloran tradicion kaj ĉiam ricevas fortan subtenon de la

Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina registaro. Esperanto certe havos belan perspektivon tiel en Ĉinio kiel en la tuta mondo, se ni pacience kaj persiste klopodos kune kun la popoloj de la tuta mondo.

Karaj gekamaradoj, vi estas ankoraŭ junaj. Ni, maljunaj es-

perantistoj, metas nian esperon sur vin. Lernu diligente, laboru peneme por fari viajn programojn pli interesaj. Profitante tiun ĝojigan okazon, mi sincere salutas kaj kore dankas diverslandajn aŭskultantojn-samideanojn pro viaj subteno kaj kuraĝigo al Radio Pekino.

Parolado de K-do Ĵelezo



Ĵelezo

Karaj gekamaradoj:

Hodiaŭ mi estas aparte ĝoja, ke mi povas ĉeesti vian celebran

kunvenon okaze de la 15-jara jubileo de la Esperanto-disaŭdigo de Radio Pekino. En la nomo de ĈEL kaj ankaŭ de mi mem, mi esprimas al vi varman gratulon kaj elkoran dankon pro viaj laboroj.

Karaj gekamaradoj, dum la pasintaj 15 jaroj, vi persiste disaŭdigis programojn en la internacia lingvo al diversaj partoj de la mondo. Pere de tiu amikeca ponto, vi ne nur helpis alilandajn esperantistojn pli kaj pli bone koni ĉinojn kaj Ĉinion, sed ankaŭ konatiĝis kun pli kaj pli multaj amikoj. Vi faris bonan laboron por la interpopola amikeco, por la Esperantomovado kaj por la mondopaco. Hodiaŭ kiam ni ĉiuj venis ĉi

tien por vin gratuli pro viaj atingoj, mi elkore deziras, ke vi, karaj gekamaradoj, daŭrigu vian signifoplenan laboron, faru viajn programojn pli interesaj, enhance pli variaj, pli allogaj, konforme al la postuloj de la vasta aŭskultantaro de la mondo, kaj ĉiamaniere servu al ili.

Esperanto estas bona komunikilo, dank' al ĝi ni trovis, trovas kaj trovos amikojn ĉie en la mondo. Tial ni kune klopedu por pli efike kaj pli vaste apliki la internacian lingvon por interpopola amikeco kaj mondopaco!

Dankon!

Gratulaj Vortoj de K-do Chen Yuan



Chen Yuan

Karaj gekamaradoj:

Hodiaŭ mi estas ĝoja, ke mi povas ĉeesti la celebran kunsidon de la Radio Pekino kaj mi volas esprimi ĉian bondeziron kaj saluton al ĉiuj kamaradoj, kiuj laboras ĉe la Radio Pekino kaj pere de la Radio Pekino, mi volas esprimi mian bondeziron al ĉiuj aŭskultantoj de la tuta

mondo. Kaj ĉe la sojlo de la 80-aj jaroj ni celebras nian laboron, tio signifas, ke ni nepre havos grandan paŝon de nia laboro. Kaj kiel ĉiuj scias, la 80-aj jaroj estas tre danĝeraj jaroj. Oni diras, ke la monda paco estas en danĝera stato kaj por ni esperantistoj estas granda kaj grava tasko por defendi la mondan pacon. Pri tio ni, ĉinaj esperantistoj kune kun la esperantistoj tra la mondo povas ludi plej gravan rolon pere de nia internacia lingvo. Pro tio, mi volas kaj mi esperas, ke Radio Pekino povos multe fari pri tio kiel ponto inter ĉiuj nacioj, inter ĉiuj landoj kaj inter ĉiuj popoloj de la tuta mondo.

En la fino de mia parolo, mi volas duafoje saluti al ĉiuj, kiuj persiste laboris dum pasintaj 15 jaroj kaj mi dankas ĉiujn aŭskultantojn, kiuj persiste aŭskultis niajn programojn dum la pasintaj 15 jaroj.

Dankon!



JUGOSLAVA ESPERANTISTINO EN BEIJING

En la lasta novembro jugoslava esperantistino fraŭlino Ŝaponjiĉ Svetlana vizitis nian ĉefurbon Beijing (Pekino), kiel membro de la Anaro de la Jugoslava Aerporta Kompanio. Je la 8-a sammonate, 5 laborantoj de nia redakcio kaj de la Esperanta Sekcio de Guozi Shudian intervidiĝis kun ŝi en la Beijing-a Hotelo kaj havis agrablan interparoladon. Du kamaradoj el ili partoprenis, kune kun la Ĉina Pupteatra Trupo, en la 11-a PIF en la jaro 1978 kaj renkontiĝis kun ŝi en Beogrado. En sia infanaĝo ŝi jam eklernis Esperanton de siaj gepatroj, tial oni povas nomi ŝin denaska esperantistino.

BELARTAJ KONKURSOJ 1980

Lige kun la 65-a UK en Stokholmo en 1980 okazos la kutimaj Belartaj Konkursoj de UEA. Ankaŭ en tiu jaro okazos konkurso pri porinfana literaturo, pri kiu detaloj estis presitaj sur pĝ. 178 de la oktobra numero de 1978 de la revuo Esperanto. Oni povas ricevi la detalan regularon de la BK, skribante aŭ al la CO de UEA, aŭ al la sekretario de la Konkursoj: s-ro Alec Venture, 7 Grosvenor Road, Wallington, Surrey, Britio, SM6 OEG.



Okaze de nia vojaĝo en Ĉinio

de S-RO VILHELMO ROWE

NIA KULTIVEJO



S-ro Vilhelmo Rowe kaj lia edzino en Beijing

SIDANTE ĉetable en nia okcidenta domo, rigardante tra la fenestro la nordanglajn montojn dormeme kuŝantajn sub frosteta aŭtuna ĉielo, mi denove demandas al mi, ĉu vere povas esti, ke antaŭ malpli ol unu monato mia edzino kaj mi estis penetrantaj Ĉinion ĝis Wuhan, ĉefurbo de la provinco Hubei kaj pulsanta hejmo de pli ol du milionoj da ĉinoj, hazarde ankaŭ promesplena agadkampo de revigliĝinta Esperanto-movado.

Unu semajnon antaŭe ni estis en Beijing (Pekino), urbo en kiu komenciĝis nia ĉina vojaĝo. Decas, do, ke ankaŭ ĉi tiu raporto komenciĝu per Beijing, ĉefurbo de Ĉinio kaj, kiel devus scii ĉiu esperantisto, dissendejo de ĉiusemajna menuo de kvar

horoj da radioprogramoj en Esperanto kaj eldonejo ne nur de la prestiĝa "El Popola Ĉinio" sed ankaŭ de seninterrompa kaj abunda sinsekvo da verketoj diversaspecaj (ĉefe politikaj sed ankaŭ infanrakontaj, kulturaj k. c.), kiuj jam delonge atestas pri la favora sinteno de la ĉina registaro al Esperanto.

Nia vizito estis studcela, kaj por ĝin realigi ni estis aliĝintaj al studgrupo (ne-esperantista), kiun organizis privata brita entrepreno (vojaĝorganizo por studado de Ĉinio). La Esperanta aspekto de nia vizito estis, do, neĉefa, sed por ni persone tre grava.

Skribinte jam antaŭe al Ĉina Esperanto-Ligo por anonci nian alvenon kaj por esprimi la espe-

ron renkonti ĉinajn esperantistojn, ni je alveno sciis nur, ke verŝajne povos efektiviĝi "ia" kontakto kun reprezentantoj de la Beijing-a esperantistaro.

En la vespero de la tago post nia alveno ni ricevis telefonan komunikadon: Venos morgaŭ al nia hotelĉambro taĉmento el Radio Pekino por nin sonbende intervjui kaj por aranĝi, ke ni en la posta vespero vizitu la sidejon de la Beijing-aj esperantistoj kaj tie prelegu. Tiel okazis, kaj — bela surprizo! — inter niaj bonvenigantoj troviĝis Zhu Mingyi, kiun ni estis renkontintaj jam antaŭe, okaze de la 60-a Japana Esperanto-Kongreso, kiun ni ĉeestis en la jaro 1973. La intervjuo por Radio Pekino tuŝis ĉefe nian esperantistan vivon kun

emfazo sur ĝia okcident-Eŭropa kunteksto. Apartan intereson vekis la denaska esperantisteco de niaj du filoj, ambaŭ jam plenaĝuloj, el kiuj la pli juna jam plurjare laborvojaĝis tutmonde dank' al Esperanto kaj nun laboras en Japanio.

Por la ĉinaj esperantistoj malabundas interalie personaj kontaktoj kun alilandaj parolantoj de nia lingvo. Se estis malfacile por ni imagi jam antaŭe ĝuste kiel emociĝe devas esti por ili bonvenigi vizitantojn el eksterlando, tamen en la momento de alveno en la kunvenejon, la realo de tiu emocio plene sin manifestis. Ni ankaŭ ĝin plene reciprokis, ĉar por ni tio estis eksterordinare privilegia evento, kian spertis malmultaj eŭropaj esperantistoj ĝis nun.

La demandoj, kiujn ni ricevis por la prelego, spegulis sinceran intereson pri la organizaj aspektoj de la Esperanto-movado en la nesocialistaj landoj, kaj mi kaptis la okazon por defendi la politikan neŭtralecon de, ekzemple, U.E.A. kaj Brita Esperantista Asocio, atentigante, ke reakciuloj povas esti sinceraj (eĉ se eraraj), kaj ke elbari ilin el la Esperanto-movado servas al neniu.

Forte konsciante pri la nedetala karaktero de nia scio pri la nuna stato de la Esperanta movado en Britio kaj en okcidento ĝenerale, ni pritraktis ĉefe tiujn aspektojn, kiujn ni plej bone konis, ekzemple la funkciadon de la delegita servo de U.E.A. Cetere, ni eltrovis dum la diskutado, ke unu faktoro, kiu kontribuas al la sento de izoliteco de la ĉinaj esperantistoj

estas la fakto, ke la alilandaj radiodissendoj ĝenerale ne estas aŭdeblaj en Ĉinio. Dum temis pri Esperanto en radio, leviĝis demando pri nia B.B.C. (Brita Radiodissenda Korporacio), kaj ni konfirmis, ke tiu organizo havas kaj ĉiam havis pri Esperantlingva servo politikon de nefleksebla rifuzo. Tio evidente iom ŝokis la ĉeestantaron.

Fine de la prelego oni transdonis al ni diversajn tute nemerititajn donacojn de ĈEL, Radio Pekino, EPC kaj Guozi Shudian, inkluzive de rulaĵo, sur kiu estas skribita kaligrafie citaĵo de Prezidanto Mao Zedong, en kiu li sin esprimis favore al Esperanto en la jaro 1939. Tiujn donacojn ni gardos kiel trezoron.

Per konversacioj, kiuj finiĝis nur post reveturigo al nia hotelo, evidentiĝis al ni, ke la Esperanto-movado en Ĉinio avide deziras profiti la favoran situacion kreitan post faligo de la "kvarpersona bando" en 1976, etendante la uzadon de Esperanto por disflorigi internaciisman spiriton kaj por pliriĉigi kaj plivastigi la reciprokajn kontaktojn inter la ĉina popolo kaj la popoloj de aliaj landoj. Aparta revo estas, ke iam estonte Ĉinio povu gastigi Universalan Kongreson de Esperanto.

Inter la plej trafaj impresoj pri nia renkontiĝo kun la Beijing-aj esperantistoj estis la alta lingva nivelo, kiu ĉiuflanke manifestiĝis. Ni ĉerpu el ilia ekzemplo inspiron!

Krom niaj kontaktoj kun esperantistoj ni kompreneble havis okazon observi en Ĉinio la ĉiutagan vivon de la homamasoj.

Nek en Beijing nek en la poste vizititaj Chongqing (Ĉongking), Wuhan, Guilin aŭ Guangzhou (Kantono) oni provis kaŝi de ni la relative al okcidento malriĉecon, kiun ni povis propraokule rimarki. La registaro volonte konfesas, ke frontas la ĉinan popolon longa periodo antaŭ ol povos leviĝi la vivkondiĉoj ĝis vere kontentiga nivelo, sed ĝi ankaŭ prave atentigas, ke la vivo tamen estas por plej multaj homoj nekompareble pli bona ol antaŭ 1949, kiam kontinenta Ĉinio liberiĝis de la Kuomintang-reĝimo, eĉ malgraŭ tio, ke la progresado al pli bona vivo ricevis fortan kontraŭbaton dum la periodo de la "kvarpersona bando".

Ni faris al ni mem la demandon: "Al kiom el tiuj milionoj da ĉinoj, kun siaj ĉiutagaj zorgoj, povus tamen veni en la kapon la ideo lerni Esperanton?" Respondon ni ricevis en Wuhan, kie ni renkontis la ĉarman, talentan kaj energian Ikso (Xu Daorong), kiun devas koni la regulaj legantoj de revuo Esperanto. Ikso informis nin, ke lastatempe stariĝis en Hubei-provinco kursoj de Esperanto kun entute ĉirkaŭ 300 gelernantoj. Kiel en ĉiuj mondpartoj, multaj kursanoj neeviteble forfalis, sed varbi 300 personojn por Esperanto-kursoj en ekzemple Londono estus en la nunaj kondiĉoj, nu, fantaziaĵo, kvankam en Britio ne mankas lernolibroj, vortaroj, liberaj horoj, kunvenejoj, aŭ okazoj por poste uzi Esperanton en internaciaj medioj.

Al niaj multaj ĉinaj amikoj ni diras ne nur "Koran dankon", sed kun firma intenco ankaŭ "Ĝis la revido!"



FONDIĜIS LA ESPERANTA ASOCIO DE CHENGDU

Je la 18-a de novembro de 1979, la kunveno por la fondiĝo okazis en la domo de la fremdlingva fakultato de la Sichuana Universitato. Ĝin ĉeestis pli ol 60 personoj. Ĝi ricevis gratulajn telegramojn kaj leterojn de la Ĉina Esperanto-Ligo, la Esperanta Sekcio de Radio Pekino, la Redakcio de "El Popola Ĉinio", Hubei Esperanto-Asocio kaj Esperantaj grupoj de Wuhan, Suzhou, Chongqing kaj Huainan, diverslokaj individuoj kaj respondeculo de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. La kunveno aprobis la statuton kaj elektis la gvidantaron. Vicedirektoro Liu Hongkang de la Financa Instituto de Sichuan estis elektita kiel prezidanto, profesoro Lu Jianbo de la historia fakultato de la Sichuana Universitato kaj instruisto Ning Shouren de la fremdlingva fakultato estis elektitaj kiel vicprezidantoj.

Du gvidantoj de la Propaganda Departemento de la Chengdu-a Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio ĉeestis la kunvenon kaj gratulis al la ĉeestantoj, kuraĝigante ilin kontribui al la moderniga konstruado de la patrolando per Esperanto. Post la kunveno la ĉeestantoj pririgardis ekspozicion de Esperantaj libroj kaj gazetoj.

*La kunveno por
la fondiĝo de la
Chengdu-a Es-
peranto-Asocio*



Ekspozicio de Esperantaj presajoj



REAPERIS "NIA STUDIO"

Reaperis ekde aŭgusto de 1979 la mimeografita gazeto "Nia Studo" redaktata de la Esperanta Grupo de Wuhan. En la unua numero de la reaperinta mimeografajo estis publikigitaj lerno-spertajoj de pluraj esperantistoj kaj ankaŭ informoj pri Esp-movado en kaj ekster la lando. La dua numero raportis pri la 64-a Universala Kongreso kaj la Ĉina Esperanta Labor-kunveno.

La presajo celis interŝanĝon de sperto en lernado de Esperanto. Antaŭ la kultura revolucio oni publikigis 24 numerojn kaj en la revolucio ĝi ĉesis eldoniĝi. Por la origina celo nun oni reaperigis la gazeton.

ESPERANTISTOJ- REPREZENTANTOJ EN LA KVARA KONGRESO DE LITERATURAJ KAJ ARTAJ RONDOJ

Pli ol 10 esperantistoj partoprenis en la nomita kongreso okazinta en novembro de 1979. Inter ili troviĝas famaj verkistoj, poeto, dramisto, muzikisto, literatura komentariisto kaj fotografisto. La fama verkisto Bakin estis elektita kiel vicprezidanto de la Kvara Tutlanda Komitato de la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondo kaj la unua vicprezidanto de la Ĉina Verkista Asocio. Komponisto Lu Ji estis elektita kiel prezidanto de la Ĉina Muzikista Asocio. Verkisto kaj tradukisto Ye Junjian (Cicio Mar) kaj dramisto Jin Ziguang estis elektitaj kiel membroj de la Kvara Tutlanda Komitato de la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondo. Ankaŭ ĝenerala sekretario de ĈEL kaj verkisto Chen Yuan, tradukistoj Sun Yong kaj Jin Kemu ĉeestis la kongreson.



RADIO GUIZHOU ELSENDIS INFORMON PRI LA AKTIVADO DE ESPERANTA GRUPO DE LA PROVINCO

En la lasta tempo tre viglis la Esp-movado en la urbo Guiyang de Guizhou-provinco. En la 19-a de septembro kaj la 9-a de novembro de la pasinta jaro Radio Guizhou de la provinco dufoje faris disaŭdigon pri la aktivado de la Esperanta Kurso kaj Memlerna Grupo en la urbo. Tiaj informoj pri Esp-movado fare de Radio aperis unufoje en la historio de Guizhou.

LANDA KONGRESO, JARĈEFKUNVENO KAJ PRINTEMPA SOGELO-TAGO EN FR-GERMANIO

De la 24-a ĝis 26-a de majo, 1980, okazos la Germana Esperanto-Kongreso en Berlino. Samtempe en la kadro de la kongreso okazos la Jarĉefkunveno 1980 de la Germana Esperanto-Asocio. Laŭstatute la membroj de la asocio estos invititaj al la kunveno. La Printempa SOGELO-Tago 1980 okazos de la 25-a ĝis la 27-a de aprilo en la nova gastdomo de la Herz-Jesumonaĥejo en Neustadt./Weinstrasse. (SOGELO: Sudokcident-germana Esperanto-Ligo)



ISU EN STOKHOLMO

En la kadro de la 65-a Universala Kongreso en 1980 okazos la 33-a sesio de Internacia Somera Universitato. Universitataj profesoroj kaj aliaj kvalifikitaj personoj povas proponi prelegon al la Komisiono pri ISU, kies sekretario estas prof. Bruce A. Sher-Wood, 507 S. Draper, Champaign, IL 61820, Usono. La kongresa temo en Stokholmo estos lingva diskriminacio. Oni povas proponi prelegon nekonecernan al la kongresa temo.

FONDO DE HUNAN-A ESPERANTA ASOCIO EN PREPARADO

Post la Ĉina Esperanta Laborkunveno, partoprenintoj profesoro Fu Mingdi de la ĉinlingva fakultato de la Hunan-a Normala Instituto kaj juna instruisto Liang Yuqing de la Hunan-a Financa Instituto fervore raportis pri la kunveno al la esperantistoj de la provinco. Cetere ili ellaboris projekton de statuto de la asocio kaj laborplanon. La plano inkluzivas fondon de postlabora Esperanta lernejo, kompiladon kaj eldonadon de Esperantaj lernolibroj, krestomatia, konversacia libro kaj kantaro. La Prepara Grupo decidis okazigi kunsidon de esperantistoj por interkonsiliĝi pri la fondo de la asocio.

ESPERANTO EN JILIN-PROVINCO

Depost julio de 1979, dank' al la aktiva propagando de kelkaj esperantistoj de Changchun, la ĉefurbo de Jilin, multaj interesiĝis pri Esperanto. Ili eldonis propagandan materialon "Ĉu vi volas koni aŭ lerni Esperanton?" kaj sendis ekzemplerojn al koncernaj gvidantoj de la provinco, al bibliotekoj de diversaj lokoj, al la legoĉambroj de diversaj superaj lernejoj, fabrikoj kaj institucioj. Dank' al ilia klopodo plimultaj homoj ekkonis la historion kaj la nunan staton de Esperanto. Pli ol 100 homoj eklernas la lingvon. En la provinca ĉefurbo Changchun oni fondis Postlaboran Studrondon de Esperanto, kaj ĝin direktis kamarado Gong Guotao. Nun ili estas kompilantaj lernolibrojn kun sonbendoj kaj fariĝantaj stelinsignoj. Baldaŭ ili komencos elementan kurson de Esperanto.

ESP-A GRUPO EN LA HANGZHOU-A UNIVERSITATO

Parto de la studentoj de la politika, ĉinlingva kaj fremdlingva fakultatoj fondis Esperantan grupon en la lasta tagdeko de oktobro, 1979. Veterana esperantisto kaj vicprofesoro Lu Moye de la ĉinlingva fakultato faris paroladon pri la idealo kaj nuna stato de Esp-o kaj ankaŭ pri sia sperto en lerno de la lingvo. Lia parolado multe inspiris la grupanojn.

Pri la nombro de la mondaj loĝantoj

EN la kuranta jarcento, precipe en la lastaj dekoj da jaroj, la rapida kresko de la nombro de la mondaj loĝantoj vekis grandan atenton de registaroj (ĉefe de la landoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko) kaj internaciaj publikaj opinioj.

MIRINDA KRESKO DE LA NOMBRO DE LA LOĜANTOJ

La homaro havas historion de miliono da jaroj. Oni taksis ke vivis ĉirkaŭ 270,000,000 homoj en la mondo en la jaro de la Kristonasko. Post la 16-a jarcento rapide plimultiĝis la monda loĝantaro. En la jaro 1650 la mondo jam havis 500,000,000 loĝantojn, en 1850 1,120,000,000, post 80 jaroj, t. e. en 1930 2,000,000,000 kaj post 46 jaroj, t. e. en 1976 jam pli ol 4,000,000,000. Laŭ statistiko, nun la monda loĝantaro ĉiutage plimultiĝas je 190,000 kaj ĉiujare je pli ol 70,000,000, tio signifas, ke ĉiuminute pli ol 140 beboj venas en la mondon. Nun estas laŭtakse 4,300,000,000 loĝantoj sur la terĝlobo. Se la nombro de la mondaj loĝantoj kreskos laŭ tiu rapideco, do en la jaro 2000 ĝi atingos 6,300,000,000. Tiam la homaro alfrontos serion da seriozaj problemoj pri greno,

loĝejoj, laboroj, higieno, edukado, trafiko k.a.

La loĝantoj de la tria mondo konsistigas 72% de la tuta homaro. Laŭ enketo, la monda loĝantaro meznombre plimultiĝas je 1.8% en ĉiu jaro kaj tiu de la tria mondo je 2.5-3%. Se oni kalkulas laŭ nuna kreska rapideco, do en la jaro 2000 la nombro de la loĝantoj de Azio atingos 3,078,000,000, kiu estos pli granda ol tiu de la tutmondaj loĝantoj en 1970. Latinameriko estas unu el la lokoj de la mondo, kie la loĝantaro kreskas plej rapide. En la pasinta jaro je 2.8% plimultiĝis la tuta loĝantaro en tiu regiono, kaj tiu de Azio, Afriko kaj Latinameriko kreskis je pli ol 2%, t. e. meznombre tri plenkreskuloj havas du infanojn kun aĝo de malpli ol 15 jaroj.

SEKVAĴOJ DE TRO RAPIDA KRESKO DE LA LOĜANTARO

La impeta plimultiĝo de la monda loĝantaro alportis multajn malfacilojn. Unue, la proporcio de la infanoj en la tuta loĝantaro rapide pligrandiĝas kaj tio estas granda ŝarĝo por la plenkreskuloj. Krom vivteni ilin, oni devas ankaŭ pretigi por ili loĝejojn kaj ĉiujn instalaĵojn

pri edukado, kuracado k. a. Laŭ kalkulo, se la nombro de la loĝantoj en iu lando kreskas je 1%, do oni devas elspezi 4% de la totala produktovaloru de la nacia ekonomio por vivteni kaj eduki tiujn homojn.

Kun kresko de la loĝantaro, pligrandiĝas ankaŭ la kvanto de la konsumita energio. Laŭ kalkulo, de la kristonaska jaro ĝis 1850, la mondo konsumis energion egalan al 2,700 bilionoj da kilovatto-horoj kaj de 1850 ĝis 1950 3,900 bilionoj da kilovatto-horoj. En la jaro 1850 oni konsumis energion egalan al 3 bilionoj da kilovatto-horoj, en 1947 jam 28 bilionoj, kaj en la jaro 2050 la konsumkvanto de energio atingos 780 bilionojn da kilovatto-horoj. Tio signifas, ke la jara konsumkvanto de energio en la 21-a jarcento egalos tiun de dekoj eĉ centoj da jaroj en la pasinteco. Ĉar nun la ekspluato kaj utiligo de riĉfontoj de energio estas limigitaj, la disponebla kvanto de energio por konsumado ne povas konformiĝi al la kresko de la loĝantaro.

Pro la rapida plimultiĝo de la loĝantoj la disvolviĝantaj landoj alfrontas seriozan malfacilon en nutrado. Nun sufiĉe granda parto de la mondaj loĝantoj vivas en la regionoj, kie grenprovizado estas nestabila sed la loĝantaro kreskas rapide. Kvantam sur la terĝlobo estas abun-

daj naturaj riĉfontoj kaj fekundaj kamparoj por vivteni la homaron, tamen pro diversaj kaŭzoj de socisistemoj, naturaj kondiĉoj, produktado k. a. la kresko de greno kaj aliaj manĝaĵoj estas limigita kaj ne povas longdaŭre kontentigi la bezonon de la rapide plimultiĝantaj loĝantoj. Laŭ takso, nun la kvanto de konservata greno en la mondo malkreskas jaron post jaro kaj al multaj landoj mankas greno. En la mondo ĉirkaŭ 500,000,000 homoj suferas de malsato kaj 1,500,000,000 homoj de karencio. Nur en Afriko kaj Latinameriko meznombre 10,000 homoj mortas de malsato ĉiusemajne. Por ne plu malbonigi la streĉitan grenprovizon, la produktokvanto de greno devos plimultiĝi je 120% antaŭ la 21-a jarcento. En la disvolviĝantaj landoj pliprodukto de greno devos atingi 200% en la venontaj 25 jaroj por havigi sufiĉe da manĝaĵoj al ĉiuj loĝantoj.

La rapida kresko de la loĝantaro kaŭzis malfacilecon en trovo de laboroj. Nun senlaboreco jam fariĝis unu el la gravaj problemoj en multaj landoj. La kaŭzoj de senlaboreco kaj duonsenlaboreco en malsamaj landoj estas diversaj kaj diferencaj. Krom ekspluata sistemo en iuj landoj, senlimiga kresko de la loĝantaro estas unu el la gravaj kaŭzoj. Laŭ la takso de la Internacia Laborula Organizo de UN, en 1970-1978 aldoniĝis 457,000,000 laboruloj en la tuta mondo, 290,000,000 en Azio, 55,000,000 en Afriko, 42,000,000 en Latinameriko kaj 70,000,000 en la evoluintaj landoj en Eŭropo kaj Ameriko kaj Japanio. En la disvolviĝantaj landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko 5-10% de la laborkapabluloj estas senlaboraj. En 1977 trovi-

ĝis en la tuta mondo 57,000,000 senlaboruloj.

Ankaŭ mirinda estas la nombro de la duonsenlaboruloj. Laŭ statistiko de la Internacia Laborula Organizo 20% de la laborkapabluloj en la disvolviĝantaj landoj estas duonsenlaboraj. En Latinameriko kaj la Kariba regiono multaj laborkapabluloj fariĝis superflujaj kaj meznombre kvarono de la laborkapabluloj estas senlaboraj.

La rapida kresko de la loĝantaro kaŭzas malaltiĝon de eduka kvalito. Por konformiĝi al kresko de la loĝantaro la disvolviĝantaj landoj ĉiujare devas pligrandigi je 5-8% la monsumon uzatan en edukado kaj aliaj bonstatigoj. Evidente tiu monsumo estas malfacile atingebla en multaj landoj. Alia serioza problemo estas manko de sufiĉa nombro da kompetentaj instruistoj. En iuj disvolviĝantaj landoj multaj infanoj ne povas viziti lernejojn. Laŭ statistiko de UN, 60% de la infanoj en la landoj de la tria mondo povas viziti nur elementajn lernejojn kaj 10% nur mezlernejojn. Nun en Latinameriko la nombro de analfabetoj atingis 43,000,000.

Alia sekvaĵo de la kresko de la loĝantaro estas troa koncentriĝo de la loĝantoj en urboj. Pro plimultiĝo de kamparaj loĝantoj kaj superflueco de agrikulturaj laboruloj, granda nombro da kamparanoj fluis en urbojn kaj kaŭzis ŝveliĝon de la loĝantaroj en urboj. Laŭ la lasta raporto de la Monda Banko, en la fino de la kuranta jarcento ĉirkaŭ 70% de la plimultiĝinta parto de la loĝantoj svarmos en urbojn kaj en la jaro 2000 51% de la tutmonda loĝantaro fariĝos urboj. La

nombro de la loĝantaroj de 40 urboj en la disvolviĝantaj landoj superos 5 milionojn. Plivastigo de urboj okupis multajn fekundajn kampojn kaj detruis ekologian ekvilibrecon, kaj plimultiĝo de urboj bezonas grandan monsumon por urbaj fundamentaj konstruadoj kaj alportas serion da problemoj de laboroj, eduko, nutraĵoj, medicino, sekureco k. a.

NASKOLIMIGO

La tro rapida kresko de la loĝantaro de la mondo jam vekis grandan atenton de diversaj landoj precipe en la tria mondo kaj ili jam komencis apliki politikon kaj rimedojn de naskolimigo.

Nun videbliĝas tendenco de malrapidiĝo de la kresko de la monda loĝantaro. En Ĉinio, Hindio, Indonezio, Koreio, la Filipinoj kaj aliaj landoj kun multaj loĝantoj rimarkinde malrapidiĝis la kresko de la nombro de la loĝantoj. Certa sukceso estas akirita ankaŭ en Hindio, Srilankao kaj Kolombio, kie la nasko estis malfacile limigebla, pro plenenergia propagando kaj ellaboro de koncernaj reguloj kaj leĝoj. En Indonezio, kiu okupas la kvinan lokon en multeco de loĝantoj de la mondo, la naskoprocentaĵo jam malleviĝis je 29%. En Tajlando, dank' al atento de la registaro pri naskolimigo la proporcio de la plimultiĝinta parto de la homoj rilate al la tuta loĝantaro malleviĝis de 3.2% de 1974 ĝis 2%. Ankaŭ en iuj landoj de Latinameriko la naskoprocentaĵo komencis reduktiĝi.

Ĉinio bridas kreskon de sia loĝantaro

LA loĝantaro de Ĉinio estas la plej granda en la mondo. Laŭ statistiko la nombro de ĝiaj loĝantoj en 1978 jam superis 970,000,000, t.e. preskaŭ $\frac{1}{4}$ de la tutmonda loĝantaro.

Pro la malforteco de niaj industrio kaj agrikulturo kaj la postĝinteco de nia nacia ekonomio, tiel granda loĝantaro kaj ĝia rapida kreskado prezentis grandan problemon al la moderniga konstruado de la lando. Tial, la Kvina Tutlanda Popola Kongreso, okazigita en 1979, prenis limigon de kreskado de la loĝantaro kiel strategian taskon kaj pli efikajn naskolimigon kaj bridadon de la kresko de la loĝantaro kiel unu el la dek ĉefaj laboroj plenumendaj. Jam fondiĝis la gvidgrupo pri naskolimigo, sub la Ŝtata Konsilantaro kaj gvidata de vicĉefministriro Chen Muhua. Ankaŭ en ĉiuj provincoj, municipoj, aŭtonomaj regionoj, gubernioj kaj popolkomunumoj fondiĝis tiaj organizoj por energie disvastigi la laboron de naskolimigo.

Ekde 1973, la registaro de Ĉinio starigis normon de kreskado de la loĝantaro en la plano de nacia ekonomio. Tamen, en la antaŭa longa periodo oni ne sufiĉe multe atentis la fakton, ke tro rapida kresko de la loĝantaro malhelpis la ekonomian disvolviĝon. Frue en 1956, ĉina fama ekonomikisto Ma Yinchu rimar-

kigis en sia letero, ke tro rapida kresko de la loĝantaro en Ĉinio certe malrapidigos la ekonomian konstruadon kaj plibonigon de popola vivo, kaj oni nepre devas limigi la kreskon de la loĝantaro per konvena rimedo. Bedaŭrinde, lia teorio siatempe estis rigardata kiel "nova maltusismo" kaj estis longe kritikata. Nur lastatempe, en la Konferenco pri la Nombro de Loĝantoj okazigita en Beijing restariĝis la honora reputacio de tiu maljuna specialisto kaj oni serioze diskutis la problemon pri la kresko de la loĝantaro.

Hodiaŭ, la problemo pri la nombro de la loĝantoj de Ĉinio estas tiel vaste zorgata en nia

lando pro tio, ke la serio da malfaciloj kaŭzitaj de la tromulteco de loĝantoj estas viditaj pli kaj pli klare. En la tridek jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, nia nacia ekonomio disvolviĝis sufiĉe rapide, sed pro la trorpida kresko de la loĝantaro, la multiĝo de produktaĵoj ne povis kontentigi la bezonojn de la homoj. En la socialisma Ĉinio, la kapitalo por la ekonomia konstruado devenas ĉefe el propra akumulado. Sed tro rapida kresko de la loĝantaro malhelpas la akumuladon. Laŭ kalkulo, post la Liberiĝo, por vivteni la novnaskitajn ĝis plenkreskuloj, la ŝtato kaj la kolektivoj devis elspezi grandan sumon de pli ol 1,000,000,000,000 juanoj. Ĝi

Gejunuloj en geedziĝa ceremonio



egalas trionon de la sumo akumulita en tiu periodo.

Kvankam la produktokvanto de grenoj altiĝis ĉ. trioble en la pasintaj tridek jaroj, tamen nun la meznombra porcio por ĉiu ĉino ankoraŭ estas tre malgranda. Unu el la ĉefaj kaŭzoj de tiu stato estas la kresko de la loĝantaro. Kvankam multaj loĝdomoj estas konstruitaj en grandaj kaj mezgrandaj urboj, tamen pro tro rapida kresko de la loĝantaroj la loĝejoj ankoraŭ estas malsufiĉaj. Similaj problemoj sin trovas en aliaj aferoj kiel ekz. enprofesiigo, edukado ktp.

Kial tiel rapide kreskas la loĝantaro de Ĉinio? La kialoj estas diversaj. Unue, granda estas la baza nombro de la loĝantoj en Ĉinio, milona kresko de ĝi en unu jaro jam signifas aldoniĝon de iom malpli ol 1,000,000 homoj. Due, sub influo de feŭdisma kulturo formiĝinta de miloj de jaroj, formiĝis la moro kaj kutimo multe naski. Trie, en la tuta lando centoj da milionoj da homoj laboras en agrikulturo. En la nunaj kondiĉoj, la enspezo de la kamparanoj estis decidita unuflanke de la disvolviĝo de la kolektiva produktado, aliflanke de la nombro kaj kvalito de laboruloj de sia familio. Ili nature deziras havi multajn laborulojn en sia familio, post la Liberiĝo, estas pli facile por ili kreskigi infanojn ol en la malnova socio kaj pro la restariĝo kaj disvolviĝo de la ĉina ekonomio, la vivo kaj higienaj kondiĉoj pliboniĝis, altiĝis la naskokvanto kaj grandskale malaltiĝis la mortokvanto. Krome, ankaŭ pro la postigiĝinteco de niaj sciencoj kaj kulturo kaj nepopulareco de scioj kaj teknikoj pri gravediĝoprevento kaj naskolimigo ktp.



Flegistinoj faras demonstradon pri flegado de infano al akuŝintinoj kaj iliaj familianoj.

Tamen, se oni daŭre disvolvos la ekonomion, altiĝos la enspezon de la popoloj, bone aranĝos la vivon de la senidaj gemaljunuloj, pene disvastigos naskolimigon, helpos la amasojn rompi la malnovan moralon "respekti la virojn kaj malrespekti la virinojn," kaj la malnovan kutimon rigardi multidecon kaj feliĉon, la kresko de la loĝantaro povas esti malrapidigita paŝon post paŝo.

Fakte, en la lastaj kelkaj jaroj la laboro de naskolimigo jam atingis bonan rezulton en la tuta lando. La natura kreska procentaĵo jam malleviĝis de 2.34% en 1971 ĝis 1.25% en 1978. Tio signifas, ke en 1978 naskiĝis je 8,000,000 malpli multe da beboj ol en 1971. La ĉina registaro decidis klopodi por mallevi la procentaĵon en 1979 ĝis ĉ. 1%, ĝis 0.5% en 1985 kaj poste ĝis la fino de tiu ĉi jarcento atingi la celon, ke la nombro de la loĝantoj ne altiĝos.

Nun la ŝtato decidis, ke ĉiu geedza paro havu maksimume du infanojn, kaj laŭdas malfruan

geedziĝon kaj naskon de nur unu infano. Homoj, kiuj havas nur unu infanon, aŭ maljunuloj kiuj ne havas infanon, povas ricevi premion kaj helpon de la ŝtato. La gvida grupo pri naskolimigo de la Ŝtata Konsilantaro skribis apartan leĝon pri tio. La ŝtato impostos tiujn, kiuj insistos, malgraŭ serioza admonado, generi trian infanon. En multaj urboj kaj provincoj oni praktikas similajn rimedojn kaj jam ricevis certan efikon. Ekz. la geedzoj, kiuj nur havas unu infanon, povas ricevi ĉiumonate aŭ ĉiujare subvencion kaj loĝejon same grandan al tiu por geedzoj kun du infanoj. Krome la ŝtato senpage provizas la popolojn per necesajoj por gravediĝoprevento. La medicinaj institucioj klopodas por trovi pli simplajn kaj pli efikajn ilojn kaj medikamentojn por gravediĝoprevento. Kiel ekz. oni eltiris kotonfenolon el kotonplantaĵoj por viroj, kaj eksperimentado pruvis, ke ĝi efikas 99.89% sen malutilo al la korpo. Kaj estis trovita ankaŭ alia speco de sol-



Patrineco

vebla medikamento gravediĝo-preventa por virinoj, kiu same bone efikas.

Hodiaŭ, la loĝantarkreska procentaĵo de 11 provincoj kaj urboj

jam malleviĝis ĝis 1% aŭ pli malmulte. Inter ili troviĝas la plej granda ĉina urbo Shanghai kaj la plej multthoma provinco Sichuan.

Laŭ notoj en la ĉina kroniko la nombro de la loĝantoj de Ĉinio variis jene:

jaro (p. K.)	nombro
2	59,594,978
156	56,486,856
609	46,019,956
1110	46,734,784
1290	58,834,711
1578	60,692,856
1764	205,591,017
1849	412,986,649
1949	548,770,000
1953	601,938,035
1957	656,630,000
1967	750,614,000
1978	975,230,000

Pri la naskolimigo en Shifang

de XUE JINGUAN

LAŬ ĉina mito, la diino Nu-wa povis ne nur fandi diverskolorajn ŝtonojn por fliki la ĉielon, sed ankaŭ krei homojn el terbuloj. Oni diris, ke ŝi mal-kontentis pri tia malrapida homkreado kaj svingis foliojn trempitajn en koto, tiel ke unu guto da falinta koto transformiĝis en unu homon kaj surtere ekaperis tre tre multaj homoj. Tiu ĉi mito estas tre simila al

tiu de la Okcidento pri la kreado de la homoj fare de Dio.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, rapide kreskis la nombro de ĝiaj loĝantoj, pro relativa stabileco de la socia vivo, bonaj kondiĉoj de higieno kaj sanprotekto, malgranda mortokvanto kaj feŭdisma koncepto en la homa menso, ke "pli da infanoj signifas pli da feliĉo". Nun la nombro de la loĝantoj de la pro-

vinco Sichuan (Siĉuan) preskaŭ egalas al tiu de la loĝantoj de Japanio. Antaŭ la naskolimigo, la natura kreska procentaĵo de la loĝantaro de la nomita provinco estis 3.112%. Kaj tiu de la gubernio Shifang, kiu troviĝas sur la ebenaĵo de la provinco, estis ĉ. 3.2%. La gubernio estis plej dense loĝata en la provinco. Post la naskolimigo, la natura kreska procentaĵo de la

loĝantaro de la tuta provinco en 1978 reduktiĝis ĝis 0.606%, kaj tiu de la gubernio Shifang ĝis 0.24%, ĝia naskolimiga procentaĵo atingis 99.3%, tial ĝi fariĝis unu el la avangardaj gubernioj de la provinco tiurilate.

En la kamparo de Ĉinio, estas tre malfacile akiri tian sukceson en mallonga tempo. Por informiĝi detale pri la afero, mi speciale vizitis la gubernion Shifang. Tie kamarado Yuan, estro de la naskolimiga oficejo, diris al mi: "En la pasinteco la nombro de la loĝantoj de Shifang pliiĝis tre rapide kaj tio ne konformis al la disvolviĝo de la produktado, nek al la postulo de la kvar modernigoj. Tial ni devas praktiki naskolimigon."

"Kiel pensas la kadroj kaj la amasoj pri la naskolimigo en la kamparo? Ĉu glate iras via laboro?" demandis mi.

"Kompreneble, en la komenco iuj kadroj ne havis bonan komprenon, opiniante, ke la produktado povas esti planita sed la naskado ne. Post studo de la teorio pri loĝantoj en ligiĝo kun la lokaj konkretaj kondiĉoj, kaj prezento de la fakto, ke kvankam la agrikultura produktado senĉese disvolviĝis dum la lastaj jaroj, tamen la enspezo de la komunumanoj malplimultiĝis, oni trovis, ke la naskado havas intiman rilaton kun la produktado, kaj naskolimigo estas nepre necesa. Diversnivelaj kadroj donis bonan ekzemplon en la naskolimigo. Nun 99.56% de pli ol 4,000 kadroj de la produktaj taĉmentoj en la gubernio jam alprenis naskolimigan rimedon. Komunumanoj diris: 'Gefiloj lernas de siaj gepatroj, kaj la

amasoj de la kadroj.' Kaj plie, ni solvis aktualajn problemojn de la amasoj, kiel ekzemple, plifortigi la sanprotektadon de virinoj kaj infanoj, bone zorgi la seninfanajn maljunulojn kaj premii tiujn, kiuj bone plenumas la naskolimigon. Tiamaniere la laboro de naskolimigo iom post iom disvolviĝis. Nun la komunumanoj bone komprenis, ke por pliprodukti kaj plibonigi la vivon, oni nepre devas praktiki naskolimigon. Unu vido taŭgas pli ol dek aŭdoj. Ni iru rigardi en vilaĝoj!"

Akompanate de Yuan, mi ekveturis de la guberniurbo.

Estis malfrua aŭtuno. Tamen en Sichuan regis kvazaŭ printempo. Nia ĵipo kuris sur asfaltita vojo kaj ni vidis, ke grupo kaj grupo da grasaj anasoj naĝas en riveroj interkruciĝantaj, verdaj bambuoj balanciĝas en zefiro, tritiko kaj kolzo kreskas prospere en kampoj kaj la branĉoj de oranĝarboj estas klinitaj de maturiĝintaj fruktoj. En la nebula aŭtuna pluvo komunumanoj estas prilaborantaj rizkampojn plugitajn de traktoroj. Zefiro enblovis bonan ordoron de humida grundo en nian ĵipon.

"Tre multaj virinoj kamplaboras ĉi tie! Tion mi ne vidis en aliaj lokoj, kiujn mi vizitis," diris mi al Yuan sidanta apud mi.

"Tio okazas dum la lastaj 2-3 jaroj. Nun la virinoj de Sichuan ludas tre gravan rolon en la produktado kaj la viroj kaj la virinoj ricevas egalan pagon kontraŭ egala laboro. Tamen antaŭ la naskolimigo ĉi tie nur triono de la virinoj partoprenis en la

produkta laboro, kaj la ceteraj du trionoj aŭ ripozis post akuŝo aŭ prizorgis infanojn hejme."

Dum nia interparolo la ĵipo jam enveturis vilaĝon. Antaŭ korto ĉirkaŭata de verdaj bambuoj ni vidis kelkajn junpionirojn irantaj en la korton kun brulligno en brakoj aŭ kun sitelo vektoportata. Kamarado Yuan diris al mi: "Ili helpas la seninfanan maljunulinon Lu Yongzhen. Tia prizorgo multe akcelas la naskolimigon!"

Ĵus kiam ni elĵipiĝis, iu maljunulino kun arĝentaj haroj elpaŝis el sia domo. Ŝi ĝoje salutis Yuan. Post lia prezentado mi informiĝis, ke ŝi estas neniŭ alia ol avino Lu. Eksciinte pri mia intenco, ŝi montris al mi koloran litkovrilon kaj novan tualettukon donitajn de la produkta brigado al ŝi kaj ateston pri soluleco, en kiu estas presitaj diversaj reguloj pri zorgo al seninfanaj maljunuloj. Ŝi rakontis al ni: "Mia edzo mortis antaŭ 20 jaroj, kaj mi havas neniun parencon. La registaro tre zorgas pri mia vivo. La produkta taĉmento ĉiumonate provizas min per 17.5 kilogramoj da rizo kaj donas al mi kelkajn juanojn por poŝmono. Kaj krome, oni sendas al mi brullignon kaj portas akvon por mi. Tial mia vivo havas garantion." Ŝi diris kaj kun rideto rigardis la junpionirojn. Ni adiaŭis avinon Lu kaj veturis al vilaĝo de alia komunumo. La ĵipo haltis antaŭ domo kun pajla tegmento apud rivero. Yuan diris, ke ĝi estas la hejmo de onklo Tan.

La korto de onklo Tan estis granda kaj ĉirkaŭata de verdaj bambuoj. En ĝi multaj kokoj kaj

anasoj serĉadis nutraĵon kaj tri nigraj porkoj manĝis tigojn de batato.

Pere de Yuan, mi rapide konatiĝis kun Tan. Ni ĉiuj sidiĝis kaj komencis interbabiladi.

“Ĉu vi estas sufiĉe okupata de la bredado?” demandis Yuan.

“Ĉijare mi bredas kvin porkojn. Lastatempe mi vendis du grandajn el ili kaj aĉetis per la akirita mono biciklon por mia filo,” ĝoje respondis onklo Tan.

“Vi tre zorgas pri via filo!”

“Ankaŭ li tre zorgas pri mi. Ordinare li donas al mi poŝmonon. Ĉiun festotagon li aĉetas por mi novajn vestojn kaj bongustajn manĝaĵojn.” Ĝuste kiam onklo Tan rakontis ĝoje, lia edzino eniris kun unujara bebo en brakoj kaj sidiĝis apud li.

La bebo ekridetis kaj etendis sian maneton al mi. “Kiel ĝi nomiĝas? Kiom da jaroj ĝi havas?” demandis mi la onklinon. “Ĝi ĵus travivis unu plenan jaron. Ĝia nomo estas Yang Li,” respondis la onklino.

“Ĉu la familia nomo de via filo estas Yang?” demandis mi nekomprene.

Ĝuste tiam venis paro da gejunuloj ĉirkaŭ 30-jaraj kun ŝpato sur ŝultro. Onklo Tan tuj prezentis: “Li estas mia filo Yang Dagui kaj ŝi mia filino Tan Daqun.”

Eble malgranda Yang la unua rimarkis mian nekomprenon kaj tuj klarigis: “La patro prave diris. Mi ja estas lia filo*. Responde al la alvoko de la registaro, mi venis ĉi tien. Li ne havas filon, kaj se malgranda

Tan loĝus en mia hejmo, estus maloportune por ŝi zorgi pri la gemaljunuloj. Kaj krome, mi havas tri fratojn, kiuj povas prizorgi miajn gepatrojn.”

“Ĉu viaj gepatroj konsentis kun vi?” demandis mi malgrandan Yang.


“Ili ja aprobis kaj diris, ke estas bone fariĝi filo de onklo

Tan. Tamen ĉe la komenco mi mem rigardis tion nehonora. Kaj poste mi pensis, ke en la nova socio la viroj kaj la virinoj estas egalrajtaj, kaj cetere mi amas malgrandan Tan, tial mi. . .” Tion dirinte li subite hontiĝis. Mi ĉirkaŭrigardis lian tutan familion kaj trovis, ke ambaŭ gemaljunuloj estas ridantaj kaj la junaj geedzoj ruĝiĝintaj.

Avino Lu



Yang Dagui kun sia infano en la hejmo de siaj bo-gepatroj



Kaj mi demandis onklinon Tan:

“Ĉu vi volas ankoraŭ nepon?”

“Antaŭe mi volis, sed nun ne. Nia lando havas multnombrajn loĝantaron. Se ĉiu havas nepinon kaj volas ankoraŭ nepon, do kiom da infanoj naskiĝos! Se tiel, ĉu nia vivo povus esti bonigita?”

“En la antikveco oni rigardis mankon de filo kiel la plej grandan malhonoron. Ĉu eblas vivi sen filo?”

“Tiel oni opiniis antaŭe. Sed nun la viroj kaj virinoj estas egalrajtaj. Tute egale, ĉu filo aŭ filino.”

“Ĉu ĉiuj vilaĝanoj tiel pensas?”

“Tre malmultaj volas filon por favori sian maljunecon. Ekzemple, iu geedza paro havas du filinojn kaj poste unu filon, tiel ke ili estas tre okupataj de zorgado pri siaj infanoj, malofte partoprenas en kamplaboro kaj havas malfacilan vivon. Nun ili ekkonsciis necesecon de la naskolimigo.”

“Prave. Antaŭe iuj havis malnovan ideologion. Malgraŭ la admonoj de la kadroj, ili agis laŭ sia plaĉo. Ili konsciiĝis nur kiam ili suferis perdon de intereso,” aldonis onklo Tan.

“Se malgranda Yang ne enloĝiĝus en via hejmo, ĉu vi ne timus fariĝi senhelpa post la edziniĝo de via filino?” demandis mi.

“Mi timis antaŭe. Poste la produkta taĉmento difinis sian devon zorgi pri la solecaj maljunuloj, dank’ al kio la maljunuloj

havas garantion en la vivo. Kion mi ankoraŭ timu?”

“Kiajn premiojn via produkta taĉmento donas al virino, kiu naskis nur unu bebon?” demandis mi malgrandan Tan.

“La produkta taĉmento donas laborpoentojn en la ripoztagoj postakuŝaj kaj subvencias la bebon je 3 juanoj ĉiumonate ĝis ĝi atingos la aĝon de 14 jaroj. Ĝia porcio da greno estas egala al tiu de plenkreskulo, la parcelo por privata uzo estas distribuita duone pli multe ol tiu de la ordinara komunumano, kaj ĝi estas favorata per kuracado kaj vizito al infanvartejo.”

“Ĉu plejmulto de vi volas nur unu infanon?”

“Jes.”

“Ĉu multaj ricevis naskolimigan operacion?”

“Nemalmultaj. Multaj operaciitoj estas viroj, kiuj tre zorgas pri siaj edzinoj.”

“Ĉu estas oportune fari operacion?”

“Tre oportune. Ĉiu komunumo havas kuracan servon. La komunumo aŭte veturigas tiun, kiu volas akcepti la operacion. Post la operacio la produkta taĉmento senpage donas al li aŭ ŝi nutrorigajn mangaĵojn kaj donas laborpoentojn dum la ripoztagoj. Ĉiu komunumo havas dekkelkajn nudpiedajn kuracistojn, kaj ĉiu produkta brigado havas 2-3. Ili laboras serioze kaj ne malbone faras operacion. Samtempe ili respondecas pri sanprotektado de virinoj kaj infanoj.”

“Ĉu vi vere volas nur unu filinon? Ĉu vi ne timas, ke

estonte. . .” Malgranda Yang interrompis min, dirante: “Kion timi! Kiel mia patro diris, post la edziniĝo de la filino, la gepatroj povos viziti maljunulan domon. Kaj plie, plejeble okazos, ke ŝi venigos por mi filon, same kiel mi venigis filon por miaj gepatroj!” Aŭdinte tion, ni kaj onklo Tan ne povis nin deteni de rido.

Kiam ni forlasis la hejmon de onklo Tan, mi demandis Yuan: “Ĉu estas multaj bofiloj en Shifang, kiuj loĝas en la hejmo de sia edzino?”

“Estas pli ol 1,100,” li diris.

“Ĉu oni okazigas ian ceremonion?”

“Jes. La gubernia partia komitato petas, ke ili okazigu geedziĝan ceremonion en la gubernia urbo. Sekretario de la gubernia partia komitato prezidas la ceremonion kaj pinglas ruĝan floron sur ilia brusto. La komunumo donacas al ili kelkajn agrikulturilojn. Post la ceremonio la geedza paro veturas al la hejmo de la novedzino en aŭto ornamita. Dum la tuta vojo oni tamburadas kaj tamtamadas. Kia ĝojo!”

Bedaŭrinde, mi ne povis vidi tion.


En la nebula aŭtuna pluvo nia ĵipo kuris antaŭen laŭ la vojo, ambaŭflanke de ĝi kreskis oranĝujoj kun pezaj fruktoj. Mi pensis, ke se ĉiuj aliaj vilaĝoj de nia lando faras kiel Shifang, la tasko de la naskolimigo certe plenumiĝos en la jaro 2,000.

* Laŭkutime en la ĉina kamparo se edzo enloĝiĝis en la hejmo de sia edzino, li estas rigardata kiel filo de siaj bogepatroj.

FOTOGRAFIAJ VERKOJ

Anasidoj

de SUN FAZHONG






En la verda bambuaro

de CHEN ZHONGBAO




Nova fizionomia de
paŝtejo


de YUE FENG



Bona sezono por abelbredado

de LANG QI





Gren-sunumado

de ZHAO TIANLU

Grandioza kunveno de ĉinaj literaturaj kaj artaj rondoj

LA fruvintra Beijing (Pekino) sin banis en la suno, kaj en ĝi okazis, de la 30-a de oktobro ĝis la 16-a de novembro 1979, la Kvara Kongreso de Ĉinaj Literaturistoj kaj Artistoj.

Ĝin ĉeestis pli ol 3,200 reprezentantoj de diversnaciecaj literaturistoj, dramistoj, belartistoj, muzikistoj, aktoroj, filmistoj k.s. el ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la lando. Inter ili troviĝis maljunaj verkistoj kaj poetoj kaj nove debutintaj junaj literaturistoj kaj artistoj. Ili renkontiĝis kun granda ĝojo kaj senĝene donis siajn voĉojn. Ili resumis pozitivajn kaj negativajn spertojn en literatura kaj arta laboro en la 30 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, diskutadis la taskon de literaturo kaj arto en la nova periodo kun la nuna moderniga konstruado de Ĉinio kiel ĝia celo, reviziis la statuton de la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoj kaj la statutojn de ĝiaj dependaj asocioj kaj elektis novajn estrarojn de la federacio kaj la asocioj. La kongreso estis sukcesplena. Ĝi ludos gravan rolon en antaŭenpuŝado de nia literatura kaj arta afero kaj en kreado de nova epoko de la socialisma literatura kaj arta prospereco.

En la inaŭguro Deng Xiaoping, vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, faris

paroladon al la kongreso. Li diris: “La popolo estas patrino de literaturaj kaj artaj laborantoj. La arta vivo de ĉiuj progresemaj literaturistoj kaj artistoj fontas el ilia kompakta ligo kun la popolo.” Li trafe eksplikis la partian gvidon super literatura kaj arta laboro. Li diris, ke la partia gvido signifas ne donadon de ordonoj, sed helpon al la literaturaj kaj artaj laborantoj en akirado de kondiĉoj por senĉese prosperigi la literaturan kaj artan aferon laŭ la karakterizaĵoj kaj leĝoj de literaturo kaj arto. La “mandarena laborstilo devas esti forigita”, la “administra ordonado devas esti ĉesigita”, “la problemoj kion kaj kiel verki, povos esti esplorata kaj paŝon post paŝo solvita nur de literaturistoj kaj artistoj mem en arta praktikado, kaj en tiun aferon aliaj ne intervenu krude.” Lia parolado ricevis varman aplaŭdadon de la ĉeestantaro.

RETROKONTO

Jam forpasis plenaj 30 jaroj depost la Unua Kongreso de Ĉinaj Literaturistoj kaj Artistoj. En tiu periodo la literatura kaj arta afero de Ĉinio atingis grandan sukceson kaj tamen iris malfacilan kaj zigzagan vojon.

Dum la 17 jaroj de 1949 ĝis 1966, la ĉinaj literaturistoj kaj artistoj persistis en la ĝusta

direkto de servo al la vastaj polamasoj, antaŭ ĉio al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ĉiuj branĉoj, ĉu literaturo kaj la teatro, aŭ kino kaj belarto, havis senprecedencan disvolviĝon, kaj aperis multaj bonaj verkoj. Inter la bonaj romanoj troviĝas “Konstruantoj de Nova Vivo”, kiu priskribas la profundan ŝanĝiĝon de la ĉina kamparo; “Kanto de la Juneco”*, kiu rakontas kiel ĉinaj gejunuloj vagadis, deprimiĝis kaj poste suriris la vojon de revolucio antaŭ pli ol duona jarcento; kaj “Kamaradoj sub la Ruĝa Flago”, kiu priskribas batalon de la ĉinaj kamparanoj kontraŭ kruela subpremado fare de bienuloj. Inter la bonaj dramoj estas historia dramo “Cai Wenji”, verkita de la forpasinta prezidanto de la federacio Guo Moruo, kiu rakontas kiel la antikva regnestro Cao Cao revenigis elstaran intelektulinon Cai Wenji elmigrantan al regiono de fremda nacio por disvolvi la nacian kulturon; kaj la historia dramo “Princino Wen Cheng” verkita de la forpasinta Tian Han, prezidanto de la Asocio de Ĉinaj Dramistoj, pri kiu ni raportis en la 11-a numero de nia revuo, 1979. La du dramoj montris ilian artan kuraĝecon kaj exploremon en ilia nova taksado al la historiaj personoj. La forpasinta dramisto Lao She verkis la dramon “Kloako Longxugou”, en kiu li priskribis ŝanĝiĝon de tiu fetora

malferma kloako, prezentis mo-
rojn de la Beijing-a popolo bone
konata de li kaj prikantis la
novan popolan reĝimon. Tiu
verko havigis al li la honoran
titolon "popola artisto".

Niaj filmistoj faris multajn
bonajn filmojn ŝatatajn de la
amasoj, ekzemple "Blankhara
Knabino", "Ruĝa Virina Taĉ-
mento", "Li Shuangshuang",
"Benopeta Ofero" kaj "Aktori-
noj-fratinoj". Krome sursceni-
ĝis ankaŭ multaj bonaj pekinaj
operoj kaj alilokaj operoj,
ekzemple "Liang Shanbo kaj
Zhu Yingtai", "Heroinoj de
Yang-familio" kaj "Sun Wukong
Trifoje Batis Skeletospirito"
plenaj je renovigemo kaj arta
infektivo. La pentraĵo "Kiom
Bela Estas la Patrolando", la
epopea danco "Ruĝas la Orien-
to", la baletto "Glava Socio"
kaj aliaj verkoj estas karakteri-
zita de intensa vivetoso kaj
nacia koloro. Ĉiuj supre menci-
itaj verkoj ludis grandan rolon
en kuraĝigo de la popolo al la
socialisma revolucio kaj kons-
truado, en edukado kaj kultu-
rado de la juna generacio per
socialisma moralo kaj en riĉigo
de la popola kultura vivo.

Dum la dek jaroj de la kultura
revolucio de post 1966, Lin Biao
kaj la "kvarpersona bando"
uzurpis la gvidantecon de la
literatura kaj arta laboro, prakti-
kis feŭdan faŝisman kulturenan
diktaturon kaj alportis senprece-
dencan plagon al la ĉina litera-
tura kaj arta afero. En tiuj jaroj
aperis tre malmultaj literaturaj
verkoj. De 1966 ĝis 1972 oni
faris neniu rakontfilmon. Gus-
te en tiu periodo multaj frukto-
donaj literaturistoj kaj artistoj
suferis ĉian persekutadon. Iuj
mortis pro maljusta kulpigo, kaj
aliaj fariĝis kripluloj. Sed plej-
parto de la literaturistoj kaj
artistoj ne submetiĝis humilaĉe
antaŭ la "kvarpersona bando".
Kvankam ili tiam vivis en
malfacilegoj, tamen kun amo al
la popolo iuj el ili kovadis en
la koro sian verkon kaj aliaj
senbrue penis skribadi. Fine ili
venigis la venkon de oktobro de
1976.

REPROSPERIGO

Nun jam forpasis la depresio
de la ĉinaj literaturaj kaj artaj

rondoj, kaj ree prezentiĝis ĝojiga
prospereco. En la tri jaroj post
faligo de la "kvarpersona bando"
en 1976 jam aperis, kiel fungoj
post pluvo, granda nombro da
brilaj kaj relative bonaj literatu-
raĵoj, teatraĵoj, filmoj kaj alifor-
maj verkoj. La nombro de dra-
moj sole jam superis 200. Inter
la dramoj troviĝas "Ruĝa Koro"
kaj "Kiam Ĉiuj Sonoj Estas
Haltigitaj", kiuj priskribas per-
sekutadon de la "kvarpersona
bando" al ĉinaj intelektuloj kaj
ilian batalon kontraŭ ĝi;
"Estonteco Vokas Vin" kaj
"Printempoanonce Floro", kiuj
spegas la vivon de armeo kaj
laboristoj; "Ĵurnalo-knaboj",
"Aŭroro" kaj "Chen Yi Descen-
dis Monton", kiuj rakontas
heraĵojn de la malnova genera-
cio de proletaj revoluciuloj.
Inter la romanoj estis "La
Oriento", "La Flava Rivero
Kuras Orienten" kaj aliaj. Post
la premiitaj "Ĉefinstruisto" kaj
aliaj 24 noveloj, publikiĝis bonaj
noveloj "Fabrikestro Qiao Ve-
nas al Sia Ofico", "Sanga Mag-
nolia Floro sub Murego" kaj
"Pado sur Stepo". Tre ĝojinda
por ni estas tio, ke nemalmultaj
verkoj tuŝis problemojn, kiujn la

Reprezentantoj en diskutado



Reprezentantoj en konversacio



Prezidanto Hua Guofeng kaj vicprezidanto Li Xiannian akceptas la reprezentantojn de la kongreso.



literaturistoj kaj artistoj antaŭe ne kuraĝis tuŝi dum multaj jaroj. Samtempe debutis multaj junaj literaturistoj kaj artistoj. Ili liberigis sin de pensa kateno kaj kuraĝis interveni en la vivon. Multaj komentariistoj kaj teoriistoj pri literaturo kaj arto opinias, ke la literaturo kaj arto de Ĉinio nun disponas pri multaj talentuloj kaj prezentiĝas antaŭ ili bela perspektivo.

Tiu ĉi kongreso estas senprecedence granda. Liberiĝinte el sub la regado de la “kvarpersona bando”, multaj malnovaj kolegoj revidis unuj aliajn kun rideto kaj larmoj. La varma manpremo kaj tremantaj lipoj montris ilian fortan emociiĝon.

La 83-jara poeto Xiao San, kiu la unua ĉinigis “La Internacion”, estis kondamnita kiel “spiono” en la kultura revolucio kaj perdis personan liberecon dum 10 jaroj. Li estis elektita kiel mem-

bro de la prezidantaro de la kongreso. Kiam li suriris la podion, multaj reprezentantoj iris al li kaj entuziasme manpremis kun li. Li diris sprite: “Dum la jardeko viglis diabloj kaj demonoj, riĉiĝis tamen ankaŭ la sperto de la homoj.”

En la politika ŝtormo de pli ol 20 jaroj maturiĝis la generacio de mezaĝaj verkistoj kun Liu Binyan kiel ilia reprezentanto. En la jaro 1957 li estis miskondamnita kiel “dekstrulo” pro sia verkajo malkaŝanta burokratismon kaj pro tio perdis sian liberecon je verkado. En la kongreso li faris paroladon kun emfazo, ke literaturo kaj arto nepre devas interveni en la vivon. Lia parolado ricevis varman aplaŭdadon de la ĉeestantoj. Grandan atenton altiris al si viglaj kaj ĵus debutintaj junaj verkistoj. Juna verkisto Liu Xinwu opinias, ke sen kontraŭdiroj ne ekzistas la mondo. Ankaŭ

la socialisma socio estas plena de kontraŭdiroj, tial neeviteble ekzistas en ĝi negativaj aspektoj. Batali kontraŭ niaj propraj mankoj kaj eraroj kaj kontraŭ feŭdisma veneno daŭranta dum miloj da jaroj estas tasko de la literaturo de nia epoko. Liu Xinwu, kiu laboris 15 jarojn kiel instruisto de mezlernejo, enviciĝis inter la literaturistoj per sia novelo “Ĉefinstruisto” publikigita en la jaro 1977, en kiu li montris malbonajn influojn en la kultura revolucio al geknaboj. Tiu verko estis la unua, kiu plej frue malkaŝis la esencon de la feŭda diktaturo kaj la politiko teni la popolon en malklereco, praktikataj de la “kvarpersona bando”. Lia novelo vekis atenton de la tuta lando kaj ricevis en 1978 la unuan premion por la plej bonaj noveloj. Post tio li publikigis siajn aliajn du novelojn “Vekiĝu, Frato” kaj “La Loko de Amo en la Vivo” kiu estis aperigita en nia gazeto,

1979. Nun, liaj verkoj jam estis tradukitaj en la anglan, francan, japanan kaj Esperanton.

Inter la reprezentantoj troviĝis nova filma reĝisoro Teng Wenji kun la aĝo de 35 jaroj. La muzika rakontfilmo "Vibraĵoj de la Vivo" estas verkita kaj reĝisorita de li mem. Per sia originala maniero de arto li priskribis amon inter violonisto kaj knabino, prezentis scenojn de funebrado de la popolanoj pri ĉefministro Zhou Enlai kaj ilian batalon kontraŭ la "kvarpersona bando" en aprilo de 1976, kaj prikantis la noblajn pensojn kaj sentojn de la nova generacio de Ĉinio. La filmo plaĉis al la spektantoj pro sia freŝa formo kaj kortuŝa intrigo.

La maljunaj literaturistoj kaj artistoj tre ĝojis pro la apero de novuloj en la lastaj jaroj. Xia Yan, vicprezidanto de la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj kaj prezidanto de la Asocio de Filmistoj, ĝoje diris, ke en la pasinta jaro ĉ. 100 talentaj gejunuloj en kvin filmofarejoj partoprenis en kompilado, reĝisorado, ludado kaj filmado. Li opiniis, ke la tekniko kaj arta esprimmaniero de ĉinaj filmoj postiĝis je 10 jaroj kompare kun tiuj de avangardaj landoj. Li kuraĝigis la filmistojn unuanime klopodi por atingi la avangardan nivelon.

ANTAŬENMARŜO

Dum la kongreso ĉie, ĉu en la hotelo de la reprezentantoj aŭ en la entuziasmoplena kunveno, oni povis senti la etoson, ke baldaŭ aperos tajdo de literatura kaj arta prospereco. Multaj partoprenantoj ĉeestis la kongreson kun siaj novaj verkaj aŭ novaj verkaj planoj. Maljuna verkisto kaj esperantisto Yao Xueyin skuis la ĉinan literaturan rondon per sia historia romano "Li Zicheng" kaj nun daŭrigas sian verkadon de la lasta parto de tiu romano. La tria volumo de la romano eldoniĝos en la unua duonjaro de 1980. Liu Zhixia, kiu famiĝis pro sia romano "Fervoja Gerila Taĉmento" pri la Kontraŭjapana Rezistmilito, nun verkas alian romanon "Biografio de Bovisto". Poeto Gong Mu, vicdirektoro de la Jilin-a Universitato, finis la verkon "Pri Ĉinaj Klasikaj Poemoj" kaj nun interpretas kaj komentarias la plej fruajn ĉinajn poemokolekton "Shi Jing". Su Li reĝisoris, en la sesdekaj jaroj, filmon "Liu Sanjie" pri popola legendo. La filmo priskribas saĝan kaj belan knabinon Liu Sanjie, kiu kuraĝis batali kontraŭ bienuloj per akraj polkantoj, kaj rikoltis multajn laŭdadojn de ĉinaj kaj eksterlandaj spektantoj. Nun li reĝisoras filmon prezentantan novajn


homojn kaj novajn aferojn en la moderniga konstruado. Maljuna reĝisoro Wang Jiayi reĝisoras rakontfilmon "Aroma Blanka Rozo" kiu prikantas la amikecon inter Ĉinio kaj Usono. Iuj eminentaj aktoroj esperas havi pli da ŝancoj de prezentado en siaj lastaj jaroj. La pli-ol-60-jara aktoro de pekin-opero Zhang Junqiu forveturis aliloken por fari prezentadon antaŭ ol la kongreso fermiĝis. Fame konataj maljunaj aktoro Hou Baolin kaj aktorino de Henan-opero Chang Xiangyu verkas librojn pri sia multjara sperto de prezentado por helpi la novulojn. Dum la kongreso multaj pentristoj kaj kaligrafoj faris improvizaĵojn por gratuli la kongreson.

La kongreso elektis maljunan verkiston Mao Dun kiel honoran prezidanton de la federacio kaj Zhou Yang kiel ĝian prezidanton. En sia raporto Zhou Yang kuraĝigis la verkistojn kaj artistojn sin ĵeti en la bolantan vivon por ĉerpi riĉan nutron de literaŭto kaj arto, kaj fari verkojn pri diversaj temoj kaj en diversaj formoj kaj stiloj, por ke la literaturo kaj arto de Ĉinio havu pli grandan disvolviĝon kaj prosperecon en ne-malproksima estonteco.

La elektitaj ĉapitroj de ĝi estis espigitaj kaj aperigitaj en 1978 en nia revuo.

Demando: Kion diras la luno al la suno?

Respondo: La luno al la suno diras: Vi estas tiel granda, ne estas permesate al vi eliri nokte.



Pri la altigo de la prezoj de agrikulturaj produktoj aĉetataj de la ŝtato

La altigo de la prezoj de agrikulturaj produktoj aĉetataj de la ŝtato kaj de tiuj de iuj koncernaj flankmanĝaĵoj estas grava afero en la ekonomia vivo de Ĉinio. Multaj eksterlandaj gazetoj faris tiajn aŭ aliajn raportojn pri tio kaj altiris atenton de iuj el niaj legantoj kaj amikoj. Pri tiu afero nia raportisto intervjuis respondeculon de la Buroo de Prezoj sub la Ŝtata Konsilantaro. Ĉisube ni publikigas ilian interparolon pri kelkaj koncernaj demandoj.

— La Red.

Demando: Kial la Ŝtata Konsilantaro altigis la prezojn de 18 ĉefaj agrikulturaj produktoj aĉetataj de la ŝtato?

Respondo: Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, por akceli la disvolviĝon de agrikultura produktado kaj plibonigi la vivon de la kamparanoj, la ĉina registaro sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio plurfoje altigis la prezojn de agrikulturaj produktoj aĉetataj de la ŝtato. Kompare kun tiuj en 1950, la prezoj de agrikulturaj produktoj aĉetataj de la ŝtato en 1978 altigis je pli ol cent procentoj. Interalie, tiuj de grenoj altigis je 120%. Malgraŭ tio, la prezoj de agrikulturaj produktoj estis relative malaltaj kompare kun la disvendaj prezoj de industriaj produktoj. Kaj pro la granda diferenco inter la prezoj

de la agrikulturaj kaj industriaj produktoj, la enspezoj por agrikulturaj produktoj de iuj lokoj eĉ ne povis kovri la produktokostojn. Por ŝanĝi tion, la Ŝtata Konsilantaro decidis, laŭ la propono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, altigi la ŝtatajn aĉetajn prezojn de grenoj, oledonaj produktoj, kotono, porkoj, viandbovoj, viandŝafoj, ovoj, akvoproduktoj, betoj kaj aliaj 9 specoj de gravaj agrikulturaj produktoj, sinsekve ekde marto de 1979.

Demando: Kiom oni altigis ilin?

Respondo: Kompare kun la prezoj en 1978, tiuj de la menciitaj 18 specoj de agrikulturaj produktoj estis altigitaj meznombro je 24.8%. Ekde livero de grenoj somere rikoltitaj en 1979, la prezoj de grenoj aĉetataj de la

ŝtato altigis je 20%, kaj la prezoj de grenoj superplane venditaj de produktaj taĉmentoj al la ŝtato estas je 50% pli altaj ol la novaj altigitaj prezoj. La prezoj de oledonaj produktoj altigis meznombro je 25%, kaj tiuj de la superplane liveritaj partoj estas je 50% pli altaj ol la novaj altigitaj prezoj. La prezo de kotono altigis meznombro je 15% kaj tiu de la superplane liverita parto estas ankoraŭ pli alta je 30% ol tiu prezo. La prezo de porkoj altigis meznombro je 26%. Tiuj de viandbovoj, viandŝafoj, ovoj, betoj, sukerkanoj, kanabo, ramio, kokonoj, akvoproduktoj, bovladoj, sudĉiniaj lignoj kaj mosobambuoj altigis je 20% ĝis 50%.

Demando: Bonvolu klarigi, kial oni alprenis tiun gravan paŝon?

Respondo: Dank' al la altigo de la prezoj de agrikulturaj produktoj, la kamparanoj de la tuta Ĉinio povas enspezi pliajn 7 miliardojn da juanoj. Tiu grava ekonomia paŝo farita de la Ŝtata Konsilantaro estas aprobita de la tuta popolo. Ĝi ludas aktivan rolon en redukto de la diferenco inter la prezoj de la agrikulturaj kaj industriaj produktoj, mobilizo de la okcent milionoj da kamparanoj al aktiva produktado, akcelado de la agrikultura disvolviĝo kaj simetria disvolvado de nia nacia ekonomio. Tio estas konkreta pruvo pri ilia aprobo, ke en

1979, nia lando akiris riĉan rikolton de someraj grenoj kaj kolzosemoj kaj la enaĉeta plano de tiaj agrikulturaj produktoj estis multe superplenumita kaj rekordaj kvantoj de tiuj produktoj estis atingitaj. Ankaŭ la kvanto de porkoj kaj ovoĵoj aĉetitaj de la ŝtato kreskis senprecedence, kaj pliboniĝis la provizado pri flankmanĝaĵoj en la urboj.

Pro la altigo de prezoj de agrikulturaj produktoj, la komunumoj kaj produktaj brigadoj enspezas pli multe da mono kaj havas pli grandan eblecon por pligrandigi sian reproduktadon kaj rapidigi la modernigon de agrikulturo. Ni prenu Jiangsuprovincon kiel ekzemplon: Se la komuna akumulata fonduso estus prenita el la pliigita enspezo tutprovinca laŭ la proporcio de 10.9%, do ĝi pliigus je pli ol 70 milionoj da juanoj post la altigo de la prezoj. Se oni aĉetus kemian sterkon per tiu sumo, ĉiu hektaro da agro povus ricevi 90 kilogramojn da kemia sterko, kaj se oni aĉetus traktorojn per ĝi, ĉiu produkta brigado de la tuta provinco povus ricevi preskaŭ unu promenan traktoron.

Demando: Kion oni faris pri la disvendaj prezoj de la koncernej porkonsumaj varoj, post la dirita altigo de la prezoj?

Respondo: Post la altigo de la prezoj de agrikulturaj produktoj aĉetataj de la ŝtato, la Ŝtata Konsilantaro faris necesan ordigon al la prezoj de iuj koncernej porkonsumaj varoj.

Por ne pezigi la ŝarĝon de la urbaj kaj minejaj loĝantoj, la registaro decidis ne ŝanĝi la prezojn de grenoj, manĝoleo, sukero, kotonŝtofo kaj karbo bezonataj de la popola vivo. La

deficitoj de komercaj unuoj pro la prezoŝanĝo estas kovrataj de la ŝtato. Estas antaŭvidite, ke sole pro vendado de greno kaj manĝoleo fare de ŝtataj komercejoj en 1979 la ŝtato jam donos 6.8 miliardojn da juanoj por kompensi la deficitajn. La Ŝtata Konsilantaro decidis altigi la prezojn de ok specoj de flankmanĝaĵoj kiel viandoj, kortobirdoj, ovoĵoj, fiŝoj, legomoj kaj lakto ekde la 1-a de novembro, 1979. Tion oni faris pro tio, ke malsamaj estas la kvanto kaj kvalito de la nomitaj varoj liverataj en diversaj lokoj kaj malsamaj sezonoj, kaj oni ne povas alpreni paŝon de kompensado kiel oni faras por la vendado de grenoj kaj manĝoleoj. Se oni ne farus necesan altigon de iliaj prezoj, la ŝtataj vendejoj suferadus deficitajn pro ili, kaj ju pli multe ili perdus, kio povus nur malaktivigi tiujn vendejojn. Kaj krome, iuj spekulantoj povus ĉasi profiton per aĉetado de tiaj varoj el ŝtataj vendejoj kaj poste ilin vendi al ŝtataj aĉetejoj kaj alporti malordon al la komerco.

Demando: Kiom oni altigos la prezojn de la ok ĉefaj specoj de flankmanĝaĵoj?

Respondo: Kompare kun la prezoj de 1978, tiu de porkaĵo altiĝis je 33%, tiu de ovoĵoj je 32%, tiu de akvoproduktoj je 33%, tiuj de bovaĵo kaj ŝafaĵo je la sumo egala al la altigita prezo de porkaĵo, tiu de legomoj estis levita kiel eble plej malmulte aŭ neniom, kaj tiuj de kortobirdoj kaj lakto estis altigitaj laŭ konkretaj kondiĉoj de diversaj lokoj kaj en rigora bridado.

Demando: Kian influon la altigo de la prezoj de flankmanĝaĵoj alportos al la vivo de la popolo? Kian rimedon la regis-

taro alprenos por solvi la aperintan problemon?

Respondo: Tio ne multe influas la vivon de la kamparanoj, ĉar ili mem produktas la plejparton de siaj bezonataj flankmanĝaĵoj kaj krome ili povas enspezi pli multe pro la altigo de la prezoj de agrikulturaj produktoj. Tamen tio alportas relative grandan influon al la vivo de la laboristoj, oficistoj kaj urbanoj.

Por solvi tiun problemon, ĉiunmonate la ŝtato donas 5 juanojn al ĉiu laboristo kaj oficisto (inkluzive de emeritoj kaj metilernantoj), kaj 8 juanojn al ĉiu laboristo kaj oficisto en brutobredaj regionoj, kie oni manĝas pli multe da viando, kio pli multe kostas. Ĝenerale, tiu monhelpo povas kompensi la pliigitan elspezon pro la prezaltigo. Kaj krome, la ŝtato altigos la salajron de 40% de la laboristoj kaj oficistoj. Tiuj aranĝoj garantios, ke la vivnivelo de plejparto de la laboristoj, oficistoj kaj urbanoj ne malaltiĝos pro la prezoŝanĝo.

Samtempe, la Ŝtata Konsilantaro decidis ankaŭ, ke la prezoj ne estos ŝanĝitaj en la venontaj kelkaj jaroj post ĉifoja prezaltigo. Kaj krome, la prezoj de kotontrikaj vestoj, kemifibraj teksaĵoj, salo, sojo, vinagro, alumetoj, keroseno, medikamentoj, aluminaĵoj, plastaĵoj, kaŭĉukaj vivbezonaĵoj, lupago por loĝdomoj, lernokosto kaj la kostoj de akvo, elektro kaj trafikado restas sensanĝaj.

Demando: Kia esenca diferenco troviĝas inter la ĉifoja prezaltigo kaj la inflacio kaj terura prezleviĝo en la malnova socio?

(Daŭrigo sur p. 27)

El leteroj de niaj legantoj

Kelkfoje artikolo estas verkita, kvazaŭ nur por specialisto. En la artikolo pri Keŝan-malsano la medicinaj terminoj abundas. En gazeto por vasta publiko estas bone, uzi ĵurnalistan stilon, ĉe kiu la necesaj klarigoj plektiĝas en komunlingva teksto.

Cetere gratulon pro via tre bona lingvouzo. Ĝi estas modela.

— J. E. Veen, Nederlando

La pentraĵoj, bildoj kaj fotoj ilustregas kaj grandvalorigas “El Popola Ĉinio”. La elekto estas malfacila. Rimarkindaj estas la ridetoj de preskaŭ ĉiuj personoj sur la fotoj.

Persone, mi fidis al la Redakcio de EPC pri la daŭrigo de la bonaj aktualaj enhavo kaj redakta laboro de la revuo. Cetere, ĉiuj niaj amikoj — abonantoj same opinias!

— Mesplede Francojis, Francio

Ĉio pri Ĉinio estas interesa, ĉar ĝi estas tre vasta kaj grava. Via ĵurnalo spegulas la nunan landon kaj ĝian historion kaj pro tio ĝi estas tre valora. Tre valora ĝi ankaŭ estas al esperantistoj kiuj lernas kaj praktikas la lingvon, kaj notu ke laŭ la “fotoj faritaj de esperantistoj” vi havas talentajn eksterlandajn legantojn!

— M. Rutter, Britio

Mi estas kontenta kun la gazeto en ĉiuj aspektoj. Eble oni raportu pli pri la plibonigo de persona vivnivelo de ordinara ĉino (kampulo, laboristo).

— Miheliĉ Lucijan,
Jugoslavio

La enhavo de El Popola Ĉinio havas pli kaj pli da artikoloj, raportoj pri via esperantujo kaj personaj aferoj de esperantistoj, tio tre ege ĝojigas min. Legante ilin mi sentas min staranta tuj proksime de vi ĉinoj.

Apartan dankon al vi pro la ĉin-stilaj pentraĵoj, kiujn vi donace sendis al mi.

Prosperon kaj progreson al “El Popola Ĉinio” kaj ĉinaj polamasoj.

— Nakamura Eizi, Japanio

Mi opinias vian gazeton tre bona ĝis nun. Mi plej interesiĝas pri vivo, kulturo kaj geografio de Ĉinio. Mi do sugestas, ke estu ĉiam pli da spaco pri tiaj aferoj. Tio estas tamen mia persona individua opinio, kaj mi plej ŝatas, ke la revuo estu tia kian la plejmulto de la legantoj ŝatas. Ĉinio estas ĉe ni ofte konata nur tra la misformigilo de la okcidenta gazetaro, neniam forgesu tion kaj tial klopodu almenaŭ vi diri laŭvoĉe, kio Ĉinio estas kaj volas esti.

— Daris Besseghini, Italio

Lastatempe, la kvalito de El Popola Ĉinio multe pliboniĝis: prezentado, fundo de la artikoloj kiuj ne plu estas nur ekonomiaj artikoloj. Ni, eŭropanoj ŝatas scii pri la artoj kaj historio kaj pensmaniero de Ĉinio. Ankaŭ filozofiaj artikoloj estu bonvenaj. Mi ŝatas ankaŭ vidi kurson de ĉina lingvo.

Mi gratulas vin ĉiujn.

— Christian Peaucleroq,
Svisio

El la lastaj numeroj de EPC, mi multe sciigis pri via lando kaj sukceso por la Esp-Movado. Mi estas entuziasma pri via laboro por la Esp-movado.

La ilustraĵoj de EPC estas tre belegaj. Precipe la lastaj paĝoj kiuj estas dediĉitaj por la infanoj estas tre interesaj, kaj instruaj en la edukado de infanoj.

Nun mi volas demandi kial vi ne trovas en via EPC la lokon iom por distri kaj ĝojigi la ĉiutagan vivon per humoro? Ĉu orientanoj ne ŝatas ridi? Laŭ mia opinio rido estas bezonata ankaŭ kiel la pano por la sano de homo.

— R. Ryszard, Pollando



GRAVA AFERO POR LA ĈINAJ SPORTISTOJ


JE la 26-a de novembro 1979 la Internacia Olimpika Komitato proklamis en Lausanne: Per koresponda voĉdonado la komitatanoj sankciis la rezolucion de la plenuma komitato en la Nagoja-kunveno, kiu agnoskas, ke la Ĉina Olimpika Komitato estas la Olimpika Komitato de la tuta Ĉinio kaj ĝi uzas la nacian standardon kaj nacian himnon de la Ĉina Popola Respubliko, kaj ankaŭ agnoskas, ke la Olimpika Komitato en Taibei uzas la nomon "La Taibei-a Olimpika Komitato de Ĉinio". Tiu racia rezolucio ricevis varman aprobon de la ĉina popolo kaj ĝia tuta sportistaro.

Jam en la dudekaj jaroj la Ĉina Olimpika Komitato estis agnoskita de la Internacia Olimpika Komitato. Post sia fondiĝo la nova Ĉinio sendis sportajn teamojn al la 15-aj Olimpikoj

okazintaj en Helsinki de Finnlando en la jaro 1952. Tamen, pro la konata kialo, Ĉinio devigite rompis la rilaton kun la Internacia Olimpika Komitato. Dum pli ol 20 jaroj la ĉinaj sportistoj neniam ĉesis sin trejnadi, ŝanĝis la postĝintan fizionomion de la sporta afero de Ĉinio kaj fine forigis de sur sia popolo la etiketon "orient-azia malsanulo"; ili rompis sume 180 mondajn rekordojn kaj gajnis 30 mondajn ĉampionecojn. Kvankam Ĉinio havas nealtan nivelon en multaj sportbranĉoj, tamen ĝiaj sportistoj timas neniam malfacilojn, sin trejnas diligente, persistas ĉe la principo "Amikeco la Unua", modeste lernas de alilandaj sportistoj kaj strebas por atingi novajn sukcesojn en la sekvontaj Olimpikoj.

Lastatempe la Ĉina Olimpika Komitato decidis sendi sian spor-

Prezidanto de la Ĉina Olimpika Komitato Zhong Shitong (la 3-a de maldekstre) okazigis ĵurnalistan kunvenon.



Emblemo de la Ĉina Olimpika Komitato

tan delegacion al la 13-aj Vintraj Olimpikoj okazantaj februare de 1980 en Placid-lago de Usono, kie oni aranĝos rapidan sketadon, artan sketadon, skiadon kaj skiadon kun pafo, kaj al la 22-aj Olimpikoj okazantaj julie en Moskvo de Sovetunio, en kiu okazos konkursoj de atletiko, naĝo, gimnastiko, arkopafo, pafo, halterlevo, korbopilado, flugpilado, piedpilado, manpilado, skermo, biciklado, remo kaj lukto.

Taiwan estas nedisigebla parto de la ĉina teritorio, la popolo de Taiwan kaj tiu de la ĉeftero estas samsangaj ĉinoj, kaj la sukcesoj atingitaj de la sportistoj de ambaŭ flankoj estas komuna riĉaĵo de la ĉina nacio. Sed en la lastaj 30 jaroj la sportistoj de la ĉeftero kaj Taiwan, dividitaj de la markolo, neniam vizitis sin reciproke. Tia situacio ne devas daŭri plu. Kaj pro tio la prezidanto de la Ĉina Olimpika Komitato skribis leteron al la Taibei-a Olimpika Komitato, esperante, ke ambaŭ flankoj frue efektivigos sportan interŝanĝon, lernos unu de la alia, sendos trejnistojn unu al la alia, kune faros trejnan laboron antaŭ la sekvontaj internaciaj Olimpikoj kaj klopodos por altigi la nivelon de la ĉinaj sportistoj.



Bogda en matenruĝo

La Montpinto Bogda

Bogda kun sia impona ĉefpinto 5,445 metrojn super la marnivelo, situanta sudoriente de Fukang-gubernio en la Xinjiang (Hingiang)-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, estas la plej alta pinto en la orienta parto de Tianshan-montaro de Ĉinio.

Bogda konsistas el 7 neĝpintoj pli ol 5,000 metrojn altaj kaj pluraj pintoj pli ol 4,000 metrojn altaj. La 7 neĝpintoj viciĝas de oriento al okcidento kaj similas la sep stelojn de la Granda Ursino.

La fama pitoreska Tianchi-lago sin trovas ĉe la piedo de Bogda. Pri ĝi cirkulas multaj belaj legendoj. En la brila spegulo de la klara lago ĉiam sin rigardas la neĝkovrita Bogda. Ĝia rava pejzaĝo allogas ĉinajn kaj alilandajn turistojn. Al tiu loko ekskursas kontinua fluo da turistoj inter junio kaj septembro ĉiujare.

de la Ĉina Asocio
de Montgrimpa Sporto




Turistoj sur
Tianchi-lago




Lago ĉe glaĉero

Tianchi-lago bra-
kumita de verda
montoj



Floroj sub Bogda





Floroj sub Bogda



La montaro Tianshan

TIANSHAN kuŝas en la meza parto de la Xinjiang (Hingiang)-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, dividante ĝin en du partojn, la sudan kaj la nordan. Ĝi sin etendas okcidenten al Sovetunio kaj orienten ĝis Hami de Xinjiang, kun totala longeco de pli ol 2,500 kilometroj, pli ol 1,700 kilometroj en Ĉinio, kaj kun larĝeco de 100-400 kilometroj. Ĝiaj ĉefaj pintoj altas pli ol 4,000 metrojn super la marnivelo kaj estas ĉiam kovritaj de neĝo. Ĝia ĉefa pinto Tomur, fama en Ĉinio, altas je 7,435 metroj. Aydingkol-lago, kiu troviĝas en Turpan-baseno ĉe la suda flanko de la orienta parto de Tianshan, estas la plej malalta loko de Ĉi-

nio, 154 metrojn malsuper la marnivelo.

Pro laboro, plurfoje mi vojaĝis al Tianshan, kie mi veturante aŭte aŭ ĉevale, aŭ piedire pririgardis ĝiajn glacipintojn kaj neĝvalojn, riverojn kaj stepojn. Tianshan havas pli ol 6,800 glaciriverojn kun totala areo de pli ol 9,500 kvadrataj kilometroj. Plejparto de ili koncentriĝas en la montoj Tomur kaj Harktau. La ĉirkaŭaĵo de Tomur-pinto estas unu el la grandaj aktivadaĵoj de glaciriveroj de Ĉinio. Tie troviĝas kvar grandaj glaciriveroj, ĉiu kun longeco de pli ol 30 kilometroj. La nuboskrapantaj neĝmontoj kun glaciaj pendaĵoj



brilegas sub la suno, kio formas aparte ĉarman pejzaĝon de Tianshan, kiu allogas ĉinajn kaj alilandajn montogrimpistojn.


Tianshan havas multajn belajn lokojn, inter kiuj Tianchilago estas fama en- kaj eksterlande pro sia ĉarma pejzaĝo kaj tre vizitinda por turistoj. De Urumĉi nordorienten pli ol 70 kilometrojn, oni povas veturi en aŭto al la piedo de la alta pinto Bogda en la orienta parto de Tianshan. Kaj de tie aŭto devas ascendi la monton spirale laŭ la ŝoseo, kaj la klimato fariĝas pli kaj pli malvarmeta. Kiam la vojaĝantoj enuiĝas de la montogrimpado, subite la aŭto sin ĝiras dekstren en valon, kaj antaŭ la okuloj prezentiĝas larĝa ebenaĵo. Baldaŭ aŭto venas al Tianchilago, kiun iu poeto priskribis kiel jaden sur la ĉielo. Tianchilago situas inter altaj montoj kaj neĝaj montpintoj, 1,980 metrojn super la marnivelo, kvazaŭ spegulo inkrustita ĉe la monttalio de montpintoj.

Tianchi-lago havas areon de 4.9 kvadrataj kilometroj, kun longeco de 3,000 metroj kaj larĝeco de kelkcent ĝis pli ol mil metroj. La ĉirkaŭaj glaciaj montpintoj, neĝmontoj kaj piccoj, reflektitaj en la akvo de la lago, estas tre ravaj, ke oni sentas sin kvazaŭ en fea lando.

Sayram-lago en la okcidenta parto de Tianshan estas pli alta situata kaj pli granda ol Tianchilago. Ĝia ĉirkaŭaĵo estas brakumita de altaj montoj, inter kiuj kuŝas fermita baseno, kiu estas

bona somera paŝtejo. Somere sur la montdeklivoj kaj lagobordoj pompas floroj kaj paŝtiĝas gregoj de ŝafoj, kaj la jurtoj dislokiĝas kiel blankaj veloj en verda maro. Ĉiun someron kazaĥaj kaj mongolaj paŝtistoj okazigas en tiu loko foiron kaj ĉevalkonkurson, luktadon kaj aliajn sportojn.

Xinjiang okupas sesonon de la areo de Ĉinio, tamen ĝia akvokvanto estas nur 28-ono de la totala akvokvanto de la lando, tial ĝi estas konata kiel seka regiono. Sed sude kaj norde de Tianshan ĉiam fluas riveroj kaj prospere kreskas diversaj plantoj, kion oni devas ŝuldi al la neĝmontoj kaj glaciriveroj de Tianshan. Ili servas kiel grandaj



Paŝtejo ĉe la piedo de Tianshan

Tianchi-lago



akvorezervejoj kun totala kapacito de pli ol 180,000,000,000 kubmetroj da akvo, provizas la riverojn sude kaj norde de Tianshan per sufiĉa akvo kaj akvumas la sekajn terojn. La riveroj Ili kaj Kaidu fontas el Tianshan. Ĝi estas ankaŭ unu el la fontoj de Tarim-rivero, la plej longa kontinenta rivero de Ĉinio. Sude kaj norde de Tianshan konstruiĝis multaj akvorezervejoj kaj hidroelektrejoj.

Tianshan estas landfama paŝtejo kun multaj fekundaj stepoj. Somere, gregoj de ŝafoj, bovoj kaj ĉevaloj moviĝas en la verda maro.

En Tianshan multe kreskas pinoj, piceoj, betuloj kaj poploj, kaj ankaŭ neĝlotusoj, fritilario, koptiso kaj aliaj drogherboj. En Tianshan vivas multaj raraj bestoj, kiel Tianshan-cervo, antilopo, kurbkorna ŝafo, neĝkoko, bruna urso kaj marmoto. Tianshan havas riĉfontojn de karbo, fero, kupro, petrolo kaj jado. Inter ili ĝia rezervokvanto de karbo estas en la antaŭa vico de nia lando. Antaŭ nelonge la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio



Kruta deklivo de Tianshan

anoncis malfermon de ok montpintoj, inkluzive Bogda al montogrimpistoj. Kiel gastamaj uju- roj, Tianshan etendas siajn brakojn por varme bonvenigi diverslandajn amikojn.

(Daŭrigo de p. 22)

Respondo: Antaŭ la Liberiĝo, nia lando travivis teruran inflacion de 12 jaroj. Iom maljunaj ĉinoj ankoraŭ bone memoras la tiamajn okazaĵojn. Laŭ statistiko, la prezoj de la tuta lando de 1949 altiĝis pli-ol-8,500,000,000,000-oble, kompare kun tiuj de 1937. En 1937, oni pagis 100 juanojn por du bovoj, dum en 1949 tiu sumo eĉ ne taŭgis por aĉeti solan grajnon da rizo. La impetaj prez-

altigado kaj inflacio estis rime- do aplikita de la regantaro por transŝarĝi la ekonomian krizon al la laboranta popolo. Sed la ĉifoj prezaltigo estas laŭplane farita sub la promiso de fundamenta stabileco de la prezoj. Ĝi celas pli bone akceli la disvolviĝon de la nacia ekonomio. Samtempe kun la prezaltigo, la ŝtato donas monhelpon al la laboristoj kaj oficistoj, tial la nuna faro estas esence malsama ol la inflacio en la malnova Ĉinio.

Demando: Kiel statas la ĉina merkato post la prezaltigo?

Respondo: Dum la prezaltigado, la ŝtato plifortigis la kontroladon al la prezoj en la merkato. Fondiĝis ĉiuloke specialaj kontrolaj grupoj, kiuj ĝustatempe korektis erarajn farojn de vendejoj, kie oni faris laŭvolan prezaltigon nepermesitan de la ŝtato. Tial, la prezoj restas ĝenerale stabilaj, la popolanoj trankvilas kaj la socia ordo estas bona.

WEN TIANSHEN:



Vizito al Beijing-a poŝtmarka presejo

EN la helaj laborejoj de la Beijing-a Poŝtmarka Presejo bonorde staris vico kaj vico da poŝtmarkaj presmaŝinoj. Ascendinte la platformon de kvinkolora presmaŝino, mi vidis laboristojn metantajn sur la maŝinon paperbobenojn unuflanke ŝmiritan per gluo. Je ekpremo sur ŝaltilo, la maŝino komencis presi kaj fari truojn sur la papero. Preskaŭ samtempe ĉe la alia flanko de la maŝino aperis bunta rubando de poŝtmarkoj speciale emisiitaj por la 40-a datreveno de forpaso de Dr. Norman Bethune. La poŝtmarkoj odoran-

taj je presinko montris versimilan bildon de la kanada Dr. Norman Bethune. En la bildo li zorgeme faras operacion por ĉina vundita soldato. Sub la bildo estas presita "J", la unua litero de "memoriga poŝtmarko" en la ĉina lingvo.

La Beijing-a Poŝtmarka Presejo ekpresis poŝtmarkojn en 1959. Ĝia vicestro Dong Cunqi, diplomito de la Centra Belarta Instituto en la 50-aj jaroj, varme akceptis nin. Dum preparado de konstruo de la presejo, li lernis teknikon de farado de poŝtmar-

kaj presplatoj en la Orienta Eŭropo. Li rakontis al ni, ke en la malnova Ĉinio poŝtmarkoj ofte estis presitaj en Britio aŭ Usono. En la unuaj jaroj post la fondiĝo de la popola respubliko, kvankam ni povis mem presi ĉiujn poŝtmarkojn, tamen ili estis en malmultaj koloroj. Nur post kiam tiu ĉi presejo estis finkonstruita, pliiĝis instalaĵoj kaj pliboniĝis la prestekniko, la ĉinaj poŝtmarkoj fariĝis pli belaj kaj enhavoriĉaj.

Li estas atestanto pri la progreso de poŝtmarka presado en la nova Ĉinio. Li diris rememore: "La specialaj poŝtmarkoj 'Arbara Industrio' estis presitaj en 1958. Ĝiaj desegnaĵoj estis presitaj per gravura arto kaj ĝiaj linioj estas fortaj. En 1960 ni presis la serion da poŝtmarkoj 'Oraj Fiŝoj', utiligante fotogravuradon kolorriĉan kaj delikatan." Li akcentis: "Ni aplikis kompare komplikan presteknikon en 1963. Tiam ni presis la poŝtmarkojn 'Pejzaĝoj de Huangshan-monto', kiuj estis presitaj per fotogravurado kaj intajlo. Dank' al la avantaĝoj de fotogravurado ni bone prezentis la variecon de la koloroj de la pejzaĝoj, kaj per fortaj strekoj intajlo prezentis la imponajn montpintojn kaj pinojn. Tial la poŝtmarkoj estis tre ŝataj de filatelistoj en- kaj eksterlandaj."

Kun granda intereso mi vizitis la presplatan laborejon de la presejo. Mi propraokule vidis la faradon de presplatoj de poŝtmarko pri ŝminkita vizaĝo de pekinopera rolulo. Unue, en la elektronika kolordivida maŝino la originala bildo estis dividita en kolorojn flavan, ruĝan, bluan k. a. Post retuŝado oni transfotis la negativon en pozitivon per

elektronika ciferegata aŭtomata kamerao kaj tiel la formato de la originalo reduktiĝis en tiun de ordinara poŝtmarko.

Kompletiginte la pozitivon, laboristoj metis ĝin sur karbo-paperon por ekspono. Post korodo la bildo de poŝtmarko klare restis sur prescilindro.

Dum vizitado mi rimarkis, ke laboristoj manipulas la maŝinojn lerte kaj atenteme. Ili neniam interparolas kun tiuj kiuj okupiĝas pri la presplato prilaborata, ĉar eĉ salivero malutilas al la kvalito de presplato. El tio mi vidis, kiom da zorga laboro kondensiĝis en presado de poŝtmarkoj!

Mi pririgardis multajn poŝtmarkojn de la nova Ĉinio konservatajn de la presejo. La poŝtmarkoj kun pandoj pentritaj de fama pentristo Wu Zuoren havis grandan debiton en Japanio kaj 500,000 kompletoj da ili estis venditaj; alia poŝtmarka serio "Krizantemoj" estis mendita de angloj por 40,000 pundoj.

Poŝtmarkoj de la nova Ĉinio montris la vojon de la ĉina re-

volucio per sia forta nacia koloro, majestaj kaj belaj desegnaĵoj kaj riĉaj enhavoj, kiel ekzemple, poŝtmarkoj "Solenio de la Fondiĝo de la Popola Respubliko", "Agrara Reformo" kaj "Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko"; ili prezentis belan bildon pri la moderniga konstruado de la lando.

Plejparto de la poŝtmarkoj de Ĉinio estas 4-cendaj kaj 8-cendaj. Por letero adresita al loĝanto en la sama urbo oni uzas 4-cendan poŝtmarkon; kaj por tiu al adresato aliloka oni devas uzi 8-cendan poŝtmarkon. Dum la tridek jaroj post la fondiĝo de la respubliko la valoroj de poŝtmarkoj restas senŝanĝaj. Krome, laŭ specialaj bezonoj la poŝto emisiis ankaŭ poŝtmarkojn 0.5-cendajn kaj 20-juanajn (1 juano=100 cendoj). Interparolante kun poŝtmarka specialisto, ni informiĝis: La nova Ĉinio emisiis proksimume 400 seriojn da poŝtmarkoj. La elcentoj konsistigitaj de la memorigaj kaj specialaj poŝtmarkoj estas tre multaj, nome 90% de la emisiitaj. Kamaradoj de la presejo

diris al ni, ke la memorigaj poŝtmarkoj prenas kiel siajn enhavojn gravajn politikajn aferojn aŭ gravajn datrevenojn, ekzemple, la naskiĝtagoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj ties forpastagoj, la datrevenoj de forpaso de prezidanto Mao Zedong, ĉefministro Zhou Enlai kaj prezidanto Zhu De. La specialaj poŝtmarkoj de Ĉinio prezentas atingojn de la socialisma revolucio kaj konstruado kaj la ĉinan kulturon kaj arton kun longa historio. Dank' al filatelo, oni povas riĉigi siajn sciojn kaj altigi sian kapablon por apreci artaĵojn. La specialisto montris al ni la foton de iu tre kara poŝtmarko sendenta kaj presita litografe. Ĝi estas "ruĝa" poŝtmarko emisiita de la Hunan-Jiangxi-a Limregiono, la revolucia bazloko en la komenco de 1928. En la mezo de la poŝtmarko estas kvinpinta stelo kun martelo kaj falĉilo en ĝia centro. Kvankam ĝia desegnaĵo estas tre simpla, tamen ĝi estas historia atestaĵo pri la ĉina popola poŝto. Tiu poŝtmarko estas



En presejo de poŝtmarkoj

konservata en la Muzeo de la Ĉina Revolucia Historio.

La poŝtmarkaj projektistoj enverŝas sian tutan koron en projektadon. Projekti poŝtmarkojn estas speciala arto. La desegnaĵoj de poŝtmarkoj devas esti kondensigitaj kaj iliaj temoj devas esti distingindaj.

En 1979, Ĉinio emisiis serion da poŝtmarkoj "La Granda Muro en Kvar Sezonoj", kiuj interesas filatelistojn en kaj ekster nia lando. La Unuatag-Koverta Kompanio de Usono faris specialan raporton pri tiuj poŝtmarkoj. La projektinto de ili estas Wan Weisheng.

Iutage ni vizitis lin en lia hejmo. La muroj de lia labor-

Artikolo de la Unuatag-Koverta Kompanio de Usono pri la poŝtmarkoj "La Granda Muro"



ĉambro estis plenaj de trutoj de puŝpingloj. Kiam ni petis la projektinton iom paroli pri la projektado de la nomitaj poŝtmarkoj, li diris kun emocio: "Mi desegnis ilin, kun konsidero pri turistoj. Mi pensis, ke la turistoj ne povas viziti la Grandan Muron en ĉiuj sezonoj. Mi do ne desegnis la Grandan Muron kiel historian vizitindaĵon, sed kontraŭe, mi desegnis ĝiajn malsamajn pejzaĝojn en la tuta jaro."

"Komence mi kunmetis en la bildoj la Grandan Muron, akvokonservejon kaj altensiajn lineojn, tiel ke oni ne povas distingi ĉefajon en ili, kaj mi mem ne kontentis pri ili. Poste mi multfoje ascendis la Grandan Muron por skizi ĝin kaj koni ĝiajn trajtojn en diversaj sezonoj." Por rigardi la pejzaĝon en neĝa tago, li kaj lia filino venis al la Granda Muro en ferioj de Printempa Festo por pentri la neĝtagan pejzaĝon. "Ĉiuj artaj kreaĵoj fontas el la reala vivo," la projektinto de la poŝtmarkoj tiel konkludis pri arta kreado.

Wan Weisheng estas Fujian-provincano, diplomita de la Nordorienta Lusin-a Arta Instituto. Kiam ni demandis lin pri lia plano por estonto, li diris: "Mi intencas projekti poŝtmarkojn de fabeloj, ĉar al mi plaĉas temoj pri la infana vivo."

En la domo de la Beijing-a Poŝtmarka Presejo mi intervidiĝis kun la 65-jara projektisto




Wan Weisheng

Sun Chuanze. La poŝtmarkoj "Pejzaĝoj de Taiwan" emisiitaj antaŭ nelonge estas lia verko. Ekde kiam li projektis la unuan poŝtmarkon de la nova Ĉinio "Celebro al la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco", li projektis ĝuste 100 seriojn da poŝtmarkoj, inkluzive de la serioj "Oraj Fiŝoj" kaj "Pejzaĝoj de Huangshan-monto".

Fine li diris: "Mi havas fortan inklinton al projektado de poŝtmarkoj. Mi klopodos en miaj lastaj jaroj por speguli per poŝtmarkoj la spiriton kaj noblan animon de nia popolo en nia moderniga konstruado." Li diris signifoplene ankaŭ: "Per belaj poŝtmarkoj de la nova Ĉinio ni konstruas ponton inter la diverslandaj popoloj."

Kiu besto manĝas kun vosto?
— Ĉiu besto manĝas kun vosto, ĉar neniu el ili demetas ĝin por manĝi.





Memorinda operacio

FRU MATENE, je la dua horo de la 20-a de marto, 1979, malsanulo kun aĝo de pli ol 60 jaroj estis portita en la Orientĉinian Hospitalon de Shanghai (Ŝanhajo). La paciento nomiĝis W. Amspacher, emeritiĝinta majorgeneralo-kuracisto, kiu vizitis Ĉinion kiel membro de la usona turista grupo de progresemaĵbienuloj. La dejoranta vicestro de la ĥirurgia sekcio Huang Yuwan tuj ekzamenis lin kaj trovis, ke lia pulso estas rapidega, lia sangpremo tre malalta kaj li estas en stato de ŝoko. La paciento sentis gaspremon en la ventro kaj doloron se oni ekpremis ĝin, precipe en la supra parto de la abdomeno. Oni diris, ke li falis antaŭ 3 semajnoj kaj post tio li sentis doloron. Oni diagnozis, ke li ricevis lezon en la maldekstra malsupra parto de la brusto. Kaj poste li ofte sentis obtuzan doloron en la maldekstra supra parto de la abdomeno. Dum ekskurso al Huangpu-rivero je la 10-a de la 19-a, li denove eksentis doloron en tiu parto, krome ankaŭ en la ŝultro. Je la tagmezo, la doloro pliakriĝis kaj daŭris ĝis la noktomezo, kaj sekve li estis sendita al la hospitalo.

Laŭ la simptomoj oni diagnozis, ke la paciento suferas hemoragion en la ventro kaj eble rompiĝis lia lieno. Oni tuj eliris malhele ruĝan sangon el la maldekstra supra parto de lia abdomeno kaj pruvis per tio la ĝustecon de la diagnozo.

Dume, la estro de la ĥirurgia sekcio Liu Shaokui jam alrapidis de sia hejmo kaj decidis tuj fari operacion por savi la pacienton. Je la 3-a horo la paciento estis portita en la operaciejon.

Sub la operacia lampo, doktoroj Liu kaj Huang komencis operacii sub helpo de aliaj kuracistoj. La abdomena kavo estis malfermita kaj montriĝis, ke ĝi plenas je freŝa sango kaj ĉirkaŭ la lieno troviĝas pluraj sangaj koagulaĵoj. Dum ekzameno ili trovis, ke en la lieno estas fendo 1 centimetron longa kaj profunda ĝis la lienmedolo. Doktoro Liu senhezite detranĉis la lienon kaj haltigis la sangadon.

La operacio iris tre glate, 1,300 mililitroj da freŝa sango kaj 1,500 mililitroj da plasmosurogato fluis en la vejnojn de W. Amspacher. La sangpremo de la paciento leviĝis iom post iom kaj lia vizaĝo reakiris la normalan koloron.

Post la operacio fondiĝis speciala flegista grupo por zorge flegadi la pacienton tage kaj nokte. W. Amspacher estis tre kontenta pri ĝia laboro kaj li diris: "La ĉinaj flegistinoj estas

tiel bone trejnitaj, ke mi rimarkis nenian diferencon inter ili kaj usonaj flegistinoj."

W. Amspacher rapide resaniĝis kaj en la sekvanta tago li jam povis moviĝadi sur la lito. La sola malagrableco sentita de li estis gaspremo en la abdomeno pro nebona funkcio de la intestoj. Kuracistoj demandis lin, ĉu li volas akcepti traktadon per ĉina akupunkturo por ellasi gason en lia intestaro. W. Amspacher ĝoje konsentis la proponon dirante: "De longe mi jam deziras vidi, kio ja estas akupunkturo."

Post dufoja apliko de akupunkturo, la paciento komencis ellasi gason kaj liberiĝis de la gaspremo en la abdomeno.

En la Orientĉinia Hospitalo, W. Amspacher propraokule vidis la operacian nivelon atingitan de ĉinaj ĥirurgoj. Li diris: "La medicina laboro de Ĉinio progresis multe pli altgrade ol ni taksis. Eĉespte de akupunktura traktado, ĉiuj ĝiaj operacioj neniom diferencas de tiuj de la Suda Karolino."

Post unu semajno, la usona tera armeo alsendis aeran ambulancan kaj revenigis per ĝi W. Amspacher al la patrolando.

Post kvar monatoj, kiam medicinaj laborantoj de la Orientĉinia Hospitalo pensis kun zorgo pri la sano de la usona amiko W. Amspacher, tri

usonaj junuloj venis al ilia hospitalo kaj diris, ke ili volas vidi ĉefhirurgon Liu Shaokui. Kaj la lasta varme akceptis ilin en sia kabineto. Post ilia sinprezento li sciigis, ke ili estas studentoj de usona medicina instituto kaj vizitas Ĉinion kiel turistoj en la someraj ferioj. Antaŭ ilia forlaso de Usono, W. Amspacher petis, ke ili vizitu la Orientĉinian Hospitalon por danki la doktorojn kaj flegistinojn, kiuj savis

lian vivon, kaj transdoni al doktoro Liu faksimilan kopion kaj tradukaĵon de la raportoĵo "Operaciado de Ĉinaj Kuracistoj", kiu aperis en la "Tagjurnalo de Greenville" de la Suda Karolino de Usono je la 29-a de majo 1979.

Doktoro Liu demandis ilin pri la sano de doktoro W. Amspacher. La usonaj amikoj diris, ke li fartas bone, jam rekomencis

labori, kaj li multe dankas la ĉinajn medicinistojn, kiuj savis lian vivon. Parolante, ili montris foton de W. Amspacher al la kuracistoj. Aŭdinte tion de la amikaj senditoj, doktoro Liu kaj la flegistinoj sentis apartan ĝojon. Akompanate de doktoro Liu, la tri usonaj amikoj pririgardis la ĉambrojn, en kiuj W. Amspacher estis operaciita kaj flegata, kaj faris fotojn por memoro.


Jam komencis produkti la Malvarma Laminejo de Maldika Lado sub la Fera-Ŝtala Kompanio de Wuhan. La laminejo estis ekipita de FRG. La foto montras kunan laboron de teknikistoj de ambaŭ landoj.

Sube maldekstre:

La hejmo de s-ro Wellner, ĝenerala konsilanto de produktado en Wuhan

Sube dekstre:

La infanoj de la germanaj specialistoj kaj laboristoj helpantaj en Ĉinio estas instruataj de fraŭlino Qutz.



Specialistoj de la FRG en Ĉinio




SKULPTAĴO



Arbido kaj Knabineto
de ZHU ZUDE.

En parko


Pentrado




Sakludo




Mi rigardu!



Dimanço en la parko Norbu Lingka



Post neĝado



Kiel interese!



Kiel mi edukis miajn infanojn?

MI estas emerita instruistino de elementa lernejo de Beijing (Pekino). Mi havas tri duonfilojn. En 1961, kiam mi edziniĝis kun la patro de la infanoj, la plej aĝa Changjiang estis 12-jara, la dua Changyuan 10-jara kaj la plej juna Changhong 8-jara, kaj vivis kune kun ni ankaŭ mia pli-ol-60-jara bopatrino.

Kiam mi aliĝis al la familio, mi trovis, ke la tri infanoj estas tre petolemaj kaj malpuraj kiel kotaj simioj. Ili ne havis kutimon de pureco, kaj pro dorlotado de sia avino ili vivis neregule, ne ŝatis labori kaj lernis maldiligente. Kion fari? Mi pensis, ke mi jam fariĝis ilia patrino, do mi devas helpi ilin.

INTIMIGI LA RILATON

En la komenco, verdire, ne estis intima rilato inter mi kaj la infanoj. La tri infanoj sin tenis malproksime de mi kaj ne salutis min. Kaj mi ne trovis ilin karaj por mi. Foje mi vidis, ke miaj kolegoj konkure aĉetis jujubojn. Mi ŝerce diris: "Kia frandemo!" Sed ili respondis: "Vi ne scias, niaj infanoj tre ŝatas jujubojn." Mi pensis: Ankaŭ mia familio havas tri infanojn, tamen mi ne scias, kion ili ŝatas manĝi, mi eĉ ne pensis pri aĉeto de manĝaĵo por la infanoj. Mi ekkonsciis, ke mi ne zorgis pri la infanoj kiel patrino. Ekde tiam mi klopodis

por intimigi la rilaton inter mi kaj la infanoj.

Mi venigis la tri infanojn al mi kaj demandis ilin, ĉu ili salutas la instruistojn en la lernejo? La infanoj respondis: "Kompreneble!" "Ankaŭ onklinojn en la korto?" mi demandis plue. "Jes!" ili balancis la kapon. "Kiel vi devas nomi min hejme?" La infanoj honte mallevis la kapon kaj respondis: "Patrino!" Mi pacience diris al ili: "Ĉiu knabo devas esti ĝentila. Ĉiu familio havas gepatrojn kaj gefilojn. Se la membroj de familio ne zorgas unu pri alia, ĉu ĝi ankoraŭ estas familio? Mi estas via patrino kaj esperas, ke vi sciigos al mi, kion vi volas fari. Se vi faros bonon, mi vin laŭdos. Se vi prezentos racian postulon, mi konsentos. Kompreneble, mi vin kritikos, se vi faros eraron. Ĉu bone?" La infanoj respondis: "Bone!" Aŭdinte tion, mia edzo ĝoje balancadis la kapon. Li, estro de elementa lernejo, estis tre okupata. Por intimigi la rilaton inter mi kaj la infanoj, li diris al ili, ke ili ĉiam sin turnu al mi se ili volas ion.


La infanoj ne havis bonan kutimon de pureco, ne ŝatis bani sin, kaj ne lavis al si la vizaĝon kaj piedojn nokte. Mi lavis al ili la vizaĝon, manojn kaj piedojn kaj aĉetis novajn jaketon kaj pantalonon por ĉiu el ili. La infanoj ekhavis tute novan fizionomion. Mi postulis, ke ili lavu al si la vizaĝon, piedojn kaj ŝtrumpetojn antaŭ enlitiĝo, kaj siestu en somero. Krome, ili ankaŭ devis preni sur sin hej-

majn laborojn, kiujn ili povis fari, ekzemple balai plankon, purigi tablon kaj lavi bovlojn, por havi kutimon de laboro. Vespere de ĉiu sabato la infanoj faris resumon pri sia lernado kaj vivo en la semajno. Mi laŭdis iliajn bonojn kaj kritikis iliajn erarojn. Samtempe ili povis prezenti malfortajn punktojn de la gepatroj. Tiamaniere la infanoj akiris iom post iom bonajn kutimojn kaj komencis vivi normale.

La infanoj plej ŝatis dimanĉon. En tiu tago mi havis pli da tempo por prepari bongustan manĝaĵon por la infanoj kaj amuziĝi kune kun ili. La dua filo ŝatis ludi tablotenison, kaj la tria rigardi filmojn. Mi ĉiam subtenis iliajn utilajn aktivadojn. Escepte de speciala okazo, dimanĉe mi kutime kondukis ilin al apuda ĝardeno por ludi tablotenison, aŭ al kinejo por rigardi filmon aŭ al naĝejo. Tio ne nur havigis al ili bonan vivkutimon, sed ankaŭ riĉigis ilian postlecionan aktivadon kaj varmigis la familion. Mi ĉiam plenumis iliajn raciajn postulojn. Mi egale traktis ĉiun el ili. Pro tio la infanoj iom post iom intimiĝis al mi. Reveninte hejmen, ili ĉiam kolektis sin ĉirkaŭ mi kaj scivoleme elmetis al mi diversajn demandojn. Ili estimis unu alian kaj ne plu kverelis.

SEVERA POSTULO EN LERNADO

La tri infanoj vizitis respektive duan, kvaran kaj sesan



Wang Jinfu (la dua de maldekstre) kaj ŝiaj edzo, gefiloj kaj nepino en parko

klason. Komence, plenumante hejman taskon, ili tre malofte estis kvietaj, ofte okazis ke tiu prenis krajonon de alia aŭ ĉi tiu alies skrapgumon. Vidinte tion, mi vakigis tri tirkestojn de iu tablo kaj donis al ili po unu tirkeston por enmeti la kajerojn kaj skribilojn, kaj samtempe havigis al ili necesajn skribilojn. Mi sciigis ilin: “Ĉiu el vi jam havas kompletan de skribiloj. Bone uzu ilin kaj mi aĉetos novajn por vi, kiam ili estos eluzitaj.” Mi asignis al ĉiu el ili apartan lokon, por ke ili kviete plenumu sian hejman taskon, kaj kontrolis iliajn taskojn kaj faris al ili necesajn klarigojn pri nekomprenataj punktoj.

Mi ankaŭ rigore postulis, ke ili observu la lernejan disciplinon, kaj ne permesis al ili malfruiĝi, tro frue forlasi la lernejon, aŭ laŭvole peti forpermeson aŭ foresti de leciono sen forpermeso. Se iu infano diris, ke li suferas kap-doloron kaj ne volas viziti lernejon, mi kuraĝigis lin, ke li ne forlasu lecionon pro malsaneto, ĉar tio malutilos al lia lernado.

La tri infanoj vizitis tri lernejojn. Por kune eduki la infanojn kun la instruistoj, mi kaj iliaj ĉefinstruistoj ofte interŝanĝis informojn pri ili. Dank’ al niaj klopodoj, la tri infanoj sane kreskis en moralo, intelekto kaj fiziko.

NE INDULGI EĈ ERARETON

Proverbo diras: “Necesas dek jaroj por kulturi arbon, necesas cent jaroj por kulturi homon.” Por ke infanoj fariĝu bonmoralaj kaj povu bone servi al la popolo en la estonteco, oni zorgas ke ili ne nur kresku korpe kaj intelekte, sed ankaŭ progresu morale.

Iufoje, kelkaj glasoj sur la librobreto estis rompitaĵoj. Mi kolektis la tri infanojn por scii, kiu rompis ilin. Sed neatendite, neniu el ili konfesis sin kulpa. Mi rimarkis, ke sur la librobreto estas turbo, kiun la dua filo plej ŝatas ludi. Mi kelkfoje interparolis kun li sen alies ĉeesto, sed

li ĉiam firme neis, ke li rompis la glasojn. La afero estas bagatela, tamen mensogemo estas granda malbono. Iun tagon mi kunvokis ilin kaj rakontis al ili anekdoton pri Lenin. En sia infaneco, foje en la hejmo de fratino de la patrino Lenin verŝis inkon sur neĝblankan tablotukon. Timante ke la onklino lin riproĉos, la kunuletoj admonis lin, ke li ne konfesu. Lenin diris, ke estas li, kiu verŝis la inkon, do li devas konfesi, por ke la aliaj ne estu suspektataj. Fininte la rakonton, mi postulis, ke la infanoj lernu de Lenin. La sekvantan tagon la dua filo konfesis, ke li rompis la glasojn kiam li prenis la turbon, kaj diris al mi sian timon pro la kulpo. En la sama vespero mi kunvenigis la infanojn kaj laŭdis la duan filon kiu kuraĝis konfesi sian eraron. Tio profunde tuŝis la infanojn.

La infanoj ofte estas petolemaj. Iufoje la tria filo Changhong ludis sur strato kaj disĵetis ŝtonetojn de konstruejo sur la straton, kio malhelpis la pasantojn kaj biciklistojn. Mi kritikis lin kaj postulis, ke li rekolektu la ŝtonetojn. La knabo mire diris: “Kiom multe da tempo mi bezonos por tio!” Mi paciencie diris al li: “Vi ĵetis tiom multe da ŝtonetoj sur la straton. Ĉu vi pensis, kiom tio malfaciligos la iradon de onkloj kaj avoj kaj kiom da tempo ili malŝparos pro tio?” La infano silentiĝis kaj kun klinita kapo iris al la strato por rekolekti la ŝtonetojn. Depost tiam la infanoj ne plu estis tiel petolemaj.

Nun la tri infanoj jam grandiĝis kaj eklaboris, kaj pro sia aktiveco kaj superplenumo de la taskoj ili ricevis honoran titolon de avangarda produktanto.

VERKU POR EPĈ

Por ke "El Popola Ĉinio" fariĝu legajo ŝatata de legantoj, ni sincere esperas, ke diverslandaj legantoj verkos por ĝi:

(1) Artikolojn kaj informojn pri la Esperanta Movado en diversaj landoj, inkluzive de uzado kaj disvastigado de Esperanto en scienco, kulturo, eduko, eldono, disaŭdigo, trafiko, poŝto- kaj tele-komuniko, turismo k.a., kaj pri amika komunikiĝo inter diverslandaj esperantistoj;

(2) Informojn pri eldono de esperantaj libroj kaj revuoj aŭ recenzoj pri ili;

(3) Artikolojn pri interlingvistiko kaj esperantologio;

(4) Artikolojn pri L.L. Zamenhof kaj diverslandaj famaj esperantistoj, esperantistaj literaturistoj, artistoj kaj sciencistoj;


(5) Eseojn pri diverslandaj moroj, kutimoj, pitoreskejoj, historiaj vizitindejoj, mirindaĵoj k.a. kun nacia aŭ loka gusto;

Kaj ke ili kontribuos al ĝi legindajn literaturajn verkojn originalajn aŭ tradukitajn en Esperanto kaj fotojn faritajn de esperantistoj pri naturaj belaĵoj.

Krome, en majo de 1980 estos la 30-a datreveno de la fondiĝo de nia gazeto "El Popola Ĉinio", por ĝin celebri ni eldonos specialan numeron kaj ni ĝoje kaj danke akceptos artikolojn de novaj kaj malnovaj legantoj kaj amikoj pri nia gazeto.



Artikoloj en ĉiaj stiloj estos akcepteblaj. Post aperigo de la artikoloj en EPĈ, ni sendos al la verkintoj malgrandajn donacaĵojn.

KARIKATURO



Stucado (pri iuj literaturaj komentariistoj)

Pentrita de MIAO YINTANG



Tri juan-oj por la azeno,
sed kvin juan-oj por la
selo.

Pentrita de XIA QIAN

Elekto de la Perlo

(Daŭrigo)

III

Post kelkaj tagoj Liu Xinhua informiĝis pri la afero ĉe samvilaĝanoj. Komence ŝi ne kredis, ĉar ŝi ĉiutage kontaktiĝis kun la fratoj Guoming kaj Guoliang kaj trovis nenian zorgon pezantan sur ilia koro. Ŝi estis tre familiara kun ambaŭ fratoj kaj havis bonan impreson pri ili. En ŝiaj okuloj la fratoj estis simplaj, honestaj, laboremaj, neparolemaj kaj solidaj en laboro. Kun tempopaso ŝi pli kaj pli sentis, ke ili estas intimaj al ŝi, kaj ankaŭ la fratoj sciis tion kaj respektis ŝin. La intimo inter ŝi kaj la fratoj ne estis facile rimarkebla, sed tre delikata. Ekzemple, kiam ili vidis ŝin dum sia hasta vojirado, ili senescepte cedis al ŝi la vojon kun rideto kaj nur post ŝia foriro ili daŭrigis sian vojon. Kiam ili atingis ŝin survoje, ili certe malrapidigis siajn paŝojn kaj akompanis ŝin tempeton, iom babilis kun ŝi, kaj poste klarigis al ŝi, ke ilin atendas ia laboro, kaj rapide foriris. Kiam la brigadestro forgesis ion en distribuado de taskoj, ili iris al ŝi por atentigi. Kiam ŝi vizitis ilian familion, ili afable prezentis al ŝi seĝon, por ke ŝi havu interparolon kun ilia patrino, sed ili mem staris apude, kvazaŭ ili estus ŝiaj nevoj. Ĉio tio sentigis Liu Xinhua, ke la koroj de ili tri estas interligitaj. Sed nun ili tamen ne informis ŝin pri sia malfacilo. Eble ili hontis esprimi sian amaraĵon al ŝi, kaj ankaŭ Onklino Li kaŝis

antaŭ ŝi la aferon, kaj tio iel malagrabiligis ŝin. Kiel direktantino pri virinaj aferoj, ŝi havas la devon zorgi pri la junulinoj de sia brigado. Precepte la amatino de Guoliang, kun ŝia helpo, povos pli glate solvi sian problemon, ĉar ŝi ja estas ŝia kuzino. Ŝi maltrankvile rapidis al la draŝejo kaj trovis Onklinon Li. Ŝi tuj demandis ŝin pri la vero.

“Jes, mia nevino, tio estas vera,” diris Onklino Li kapjesante.

“Kial vi ne sciigis eĉ min?”

“Mi ne volas ĝeni vin per mia privata afero,” diris Onklino Li.

“Kiel bonkora vi estas! Sed . . .” emociiĝis Xinhua.

“Ne estas, ke mi tute ne volas sciigi vin, sed mi konsideras, ke vi mem ankoraŭ estas knabino . . .” ameme diris Onklino Li.

“Sed mi estas direktantino pri virinaj aferoj, mi devas zorgi pri tio,” Xinhua daŭrigis, “kion vi pensas nun?”

Onklino Li eldiris sian penson. Xinhua aŭskultis kun ekscitiĝo kaj respekto. “Jes, onklino, vi agas prave. Kiel akrevida vi estas!”

“Mi havas neniun alian rimeдон krom tiu penso. Via kuzino volas pli detale informiĝi pri mia familio, tio ne estas troa preten-do. Post pli detala informiĝo ĉiuj duboj estos forigitaj.”

“Miaj geonkloj kaj kuzino estas iom nebulkapaj. Antaŭe

mi faris persvadon, sed nun ili ekŝanceliĝas. Estu trankvila, mi refoje persvados ilin.”

“Knabino, kiel entuziasma vi estas!” iel ŝanĝiĝis la tono de Onklino Li.

Tiun vesperon Liu Xinhua iris al sia onklino, lumigante la vojon per poŝlampo. Vidinte ŝin, ŝia onklino manklakis, dirante: “Kia hazardo estas! Vi venas ĝuste kiam ni volas vin. Via kuzino irus venigi vin, se vi ne venus.”

Liu Xinhua sidiĝis kaj diris per intence altigita voĉo: “Ni ĉiuj estas tre okupitaj, por kio vi volas min?”

“Ho, rigardu, kian altrangulan mienon vi havas!” paŭtis la kuzino.

“Ja tiel estas!” Xinhua diris fierete. “Por kio vi volas min?”

“Mi volas peti vian opinion, ĉu ŝia fianĉiniĝo devas esti plenumita aŭ ne,” ridetante demandis la onklino.

“Ha —” Xinhua respondis kun tirata tono, “onklino, laŭ mi, vi devas demandi ne min sed mian kuzinon. Mi ne povas sola decidi la aferon.”

La kuzino okulpafis ŝin kaj diris: “Ne montru vin gravmiena! Vi estas en ilia produkta taĉmento kaj scias pli multe ol mi, kaj tial mi volas vin konsulti. Se vi ne volus helpi min, mi ne devigus vin.”

“Kio? Kiel facile vi babilas, sed li amas vin.”

“Ba!”

“Guoliang estas belaspekta,” la onklino diris balbute, “sed kial la fianĉino de lia frato volas ŝanĝi la decidon?”

“Ĉar oni konas nur la vizaĝon, sed ne la koron!” diris Xinhua simple.

“Ankaŭ vi tiel asertis, ni atendas do kelkan tempon.”

La onklino rigardis sian filinon, ŝajne ŝi trovis bazon por la prokrasto.

Xinhua diris rigardante nenium: “Helpas nenion atendi.”

“Kial?” miris la onklino.

“Estas malfacile koni la koron de homoj. Ekzemple, en la 27 jaroj, ĉu vi bone konis mian koron?”

“Vian koron?” miris la onklino.

“Jes, se vi bone konis mian koron, kial vi ne fidis al mi?”

“Ĉu mi ne fidis al vi?”

“Antaŭ longe mi jam konigis vin pri Guoliang, sed vi ankoraŭ demandis min. Ĉu tio estas via fido al mi? Mi ne diros pli multe, tiu afero min ne tuŝas, kaj cetere, mi ne estas la svatanto. Vi povas agi tute laŭ via plaĉo. Se vi ne ŝatas Guoliang, mi volontas fari alian svatadon laŭ via peto.”

“Ĉu vere?”

“Jes, tre facile. Jen troviĝas bebo naskita hieraŭ; onklino, vi povas iri venigi ĝin en vian hejmon kaj ĝi kreskos sub viaj okuloj, kaj tiam vi povos trankviliĝi.”

Ŝi eksplodis de rido kaj la kuzino frapegis ŝin sur la dorson. Xinhua tusante diris: “Nu, tion mi ne diros, kaj ni ĉesu ŝerci

nun!” Post momenta paŭzo ŝi daŭrigis serioze: “Se mi estus svatanto, mi insiste rekomendos Guoliang al vi.”

La onklino diris duonride kaj duonkolere: “Kia lango!”

“Tamen ĝi donas veron,” diris Xinhua. Tuj poste, ŝi pli detale informis ilin pri la familio de Onklino Li kaj pri la kondutoj de la fratoj. Fine ŝi konkludis: “Guoliang estas sincera kaj honesta, forta kaj diligenta, kaj neniam iros malĝustan vojon. Se tian homon vi ne ŝatas, kian do vi volas? Ne rigardu la malparolemulon kiel stultulon, tamen lia koro valoras kiel oro. Se la brigadestro ion forgesas, ambaŭ fratoj ĉiam atentigas lin. Li tiel zorgas pri la kolektivo, ĉu tamen ne pri sia edzino? Ne hezitu plu. Vin ne koncernas la sinteno de la fianĉino de Guo-

ming. Ĉiu havas sian kalkulon. Mi scias bone, ke mia onklino kaj vi estas honestaj kaj sinceraj homoj, kaj mi opinias, ke Guoliang indas esti bona edzo de mia kuzino.”

Ŝiaj vortoj ruĝigis la kuzinon kaj malsekigis ŝiajn okulojn. Ŝajnis al ŝi, kvazaŭ ŝi vidus Guoliang alproksimiĝanta. Ŝi sentis varmon en la koro kaj ankaŭ ĝojon, surprizon kaj hontemon. Xinhua manklakis kaj ridis: “Ho, mia onklino, faru preparon por akcepti vian bofilon.”

La vizaĝo de la onklino ekbrilis de ĝojo. Ŝi diris ĉe ŝia orelo mallaŭte: “Ĉu vi scias, ke la fianĉino de Guoming jam perfidis lin? Ŝi enamiĝis al iu laboristo plurajn monatojn kaj nun ili troviĝas en arda amo.”



“Ĉu vere?” surpriziĝis Xinhua.

“Sendube. Informiĝinte pri tio, ankaŭ mi ekhezitis: Ŝi enamiĝis al alia, kial ni ne povas prokrasti la fianĉiniĝon de via kuzino? Se mi trovas ankaŭ por ŝi laboriston-fianĉon. . .”

“Kaj kiel nun vi pensas?”

“Mi ŝanĝis la ideon. Vi diris prave. Mi longe meditis kaj fine trovis, ke pli bone estas, ke ni kamparanoj geedziĝu inter ni. Tiel oni povas sin helpi reciproke, ĉu en kamplaboro, ĉu en dommastrumado, interkonsiliĝi pri farendaj aferoj kaj resti ĉiam kune, ke la amo fariĝos pli forta kaj pli profunda. Vidu vian onklon. Li nun estas teknikisto, montras fierecon antaŭ mi. Li hejmenrevenas unu fojon en ĉiu semajno. Kaj se mi bezonis lian helpon, li ofte prokrastis, ĝis li sufiĉe faris liniojn kaj cirklojn sur sia papero. Se pri tio mi demandis lin, li ofte mutigis min per tiaj vortoj: ‘Vi ne komprenas, ĉiam nur maŝinpartoj!’ Mi vivis kune kun li 26 jarojn kaj sola faras ĉiujn mastrumajn kaj kampajn laborojn malgraŭ mia malforteco. Kia ŝarĝo! Mi prefere edziniĝus al kampulo.”

Aŭdinte la plendon de la onklino, Xinhua ekĝemis, dirante kun peza tono: “Onklino, vi mem edziniĝis jam antaŭ multaj jaroj, tamen vi ankoraŭ hezitas, kiam aliaj enamiĝas al laboristoj. Ne estas mirige, ke multaj havas la saman deziron. Kompreneble estas ne malbone havi laboriston kiel bofilon; ĉu estas pravigeble, ke kamparanoj malestimas eĉ kamparanojn kaj prenas sin mem kiel malnoblulojn? La vivo de ni kamparanoj pli kaj pli boniĝas kaj ni ne devas vidi nur ĝis la pinto de la nazo.”

Ŝiaj vortoj malvigligis ilin por momento, kaj subite ŝia kuzino rompis la silenton: “Vi ne kulpigu aliajn, ankaŭ vi havas mankon.”

Xinhua kapjesis: “Mi konfesas, ke mi ne bone faris mian laboron.”

“Ĉu vi povas diri, kio estas via plej granda manko?” diris la kuzino, fiksante sian rigardon sur ŝia vizaĝo.

“Kio?” demandis Xinhua kun miro.

“Vi ja havas 27 jarojn, du jarojn pli ol mi, sed kie estas mia bofrato?”

“Tio vin ne koncernas!”

“Ĉiuj observas vin por vidi, kian fianĉon vi volas.”

“Ĉu mi iam prezentis kondiĉojn por elekto de fianĉo?”

“Sed kial vi rifuzis la du svatitojn, komunuman kadron kaj laboriston nomatan Wang? Oni diras, ke vi tenas la nazon tro alten.”

Vere surpriza diro. Xinhua demandis kolere: “Kiu tiel klaciŝ?”

“Ne koleru, se vi ne estas tia,” diris la kuzino kviete. Sed iom poste ŝi atakis akre: “Se vi vere ne estas tia homo, vi edziniĝu do al kamparano. Kiom da jaroj vi havas jam? Kaj kial vi ankoraŭ ne edziniĝis? Ĉu vi timas, ke aliaj kritikos, ke vi estas rigora nur al aliaj, sed indulgema al vi mem, se vi edziniĝos ne al kamparano?”

Tiuj pikaj vortoj ekscitis kaj ofendis Xinhua. Apenaŭ ŝi estis sin ekskuzonta, ŝia onklino insultis la filinon: “Knabinaĉo, ĉu vi estas komparebla kun via kuzino Xinhua? Ŝi estas kom-

partiano kaj cetere kadro de nia brigado; ŝi estis alte klerigita, havas multan sperton kaj estas multe pli bela ol vi, kaj ŝiaj kondiĉoj por elekto de fianĉo estas multe pli favoraj ol la viaj. Kompreneble ŝi devas havi pli bonan fianĉon. Kial do ŝi nepre fianĉiniĝu al kamparano?”

La sincera laŭdo de la onklino embarasis Xinhua, kies okuloj malsekiĝis pro la miskompreno de la onklino. Ŝi diris ekscitiĝe: “Vi miskomprenis min. Se vi ne kredas min, vidu kion mi faros!”

Vidinte sian nevinon malgaja, ŝi tuj aliris viŝi al ŝi larmojn kaj karese konsolis ŝin kvazaŭ bebbon: “Ne ploru, ne ploru, via kuzino kulpas, mi helpas vin.” Ŝiaj mildaj vortoj vekis ridon ĉe Xinhua, sekve ankaŭ la onklino mem ekridis. La onklino ne trovis sian konsolon komika, sed tiujn knabinojn ridindaj kvazaŭ infanoj.

Nokte ambaŭ kuzinoj kuŝis sur sama lito. En mallumo ili interparolis korverse.

Fine la kuzino demandis Xinhua: “Kuzino, ĉu li vere estas tiel bona, kiel vi diris?”

“Jes!” Xinhua diris. “Se vi ne kredas, vi rapide edziniĝu al li kaj tiam vi certe konvinkiĝos.”

“Ĉu vi scias, kiun mi aludis?”


“Ĉu ne Guoliang?”

“Kial lin, sed lian fraton Guoming.”

“Guoming ja ne koncernas vin!”

La kuzino flustris ĉe la orelo de Xinhua: “La fianĉino de Guoming jam enamiĝis al alia junulo kaj certe rompos kun Guoming.”

(Daŭrigo sur p. 48)



La Petroĉa Rafinejo de Zhejiang en nokto

Havenurbo Ningbo en konstruado

de XIAO XUESHENG

NINGBO estas tre antikva
 Napudmara urbo situanta en
 la orienta parto de la provinco
 Zhejiang (Ĝeĝiang). Tie mi
 loĝis plurajn jarojn kaj forlasis
 ĝin antaŭ 26 jaroj. En la pasinta
 vintro mi vizitis ĝin kaj trovis
 ĝin nereconebla.

Antaŭ la fervoja stacidomo
 estas placo dekoraciita per plan-
 titaj floroj. Mi rigardis ĉirkaŭen
 kaj trovis multajn butikojn kaj
 hotelojn. En tiu loko kun
 aspekto tute malsama ol la
 antaŭa, mi perdis la orienton.
 Ne malproksime kviete fluas la
 ĉirkaŭurba rivero kaj rebrilas la
 gracia Luna Lago. Ili rememori-
 gis al mi la antaŭan aspekton de
 la placo: Ĉu ĉi tie ne estis la



sovaĝa tombejo? En 1958 fer-
 vojo atingis la urbon Ningbo kaj
 iom post iom disvolviĝis la in-
 dustrioj kaj komerco de la urbo.

Inter la fervoja stacio kaj la
 urbokvartaloj servas aŭtobusoj,
 kaj ankaŭ en la urbo funkcias
 oportunaj linioj de aŭtobusoj.
 Per aŭtobuso mi atingis la urbo-
 centron Dongmenkou.

Ĉe Dongmenkou kunfluas la
 riveroj Fenghua kaj Yuyao. En
 la riveroj estas tiel multaj ŝipoj,

ke iliaj mastoj aspektas kvazaŭ
 arbaro. Sur la bordoj viglas ne-
 goco pri fiŝoj. Ĉe Dongmenkou
 kruciĝas la stratoj Yan-an
 kaj Dongfanghong. Tie estas la
 plej movoplena komerca parto
 de la urbo.

La strato Yan-an antaŭe estis
 nomata Jiangxia. Tie estis la plej
 prospera loko de Ningbo antaŭ
 1949. Sed tiam la strato larĝis
 nur 8 metrojn kaj longis centojn
 da metroj, kaj ambaŭflanke de
 la strato troviĝis nur kelkaj ban-
 koj kaj fremdlandaj komercaj
 kompanioj. Kaj la industriojn
 oni priskribis jene: "En Ningbo
 troviĝas nur tri kaj duona
 fabrikaj fumtuboj." Tion kaŭzis
 dumpingo de iuj landoj. Ĝis la

liberigo de Ningbo en majo de 1949, multaj fabrikoj bankrotis kaj restis nur 8 fabrikoj ĉiu kun pli ol 100 laboristoj. En tiu jaro la totala industria produkto-kvanto de la urbo estis nur 31 milionoj da juanoj. Nun la urbo havas 420,000 loĝantojn, el kiuj 100,000 estas laboristoj en la 450 ŝtataj kaj kolektivaj fabrikoj.

Mi havis la ŝancon pririgardi la Ladmanĝan Fabrikon de Ningbo. Enirinte en la fabrikon mi vidis grandan stokon da mandarinaj. Vicestro de la fabriko Xu Liangcai kontente diris al mi: "Ĉijare oni havis abundan rikolton de mandarinaj kaj nia fabriko aĉetis mandarinajn kvarone pli multe ol en la pasinta jaro." Kamarado Xu aĝas 52 jarojn kaj antaŭ 1949 li estis teknikisto en tiu fabriko. Tiam la fabriko produktis nur du specojn de legomaj ladmanĝoj. Post la rikolta sezono la fabriko nur bezonis dekelkajn homojn por funkciigi ladmanĝan butikon. Sed nun la fabriko havas potencajn fontojn de krudmaterialoj kaj cetere sian propran 700-hektaran kultivejon de legomoj kaj fruktoj, kaj tial povas produkti ladmanĝojn tutjare. La nombro de la specoj de ladmanĝoj de fruktoj, legomoj, viando kaj fiŝoj superis 20 kaj la jara produktokvanto atingis 8,500 tunojn, kio estas 17-oblo de la plej alta jara produktokvanto antaŭ la Liberiĝo. Kamarado Xu aldona, ke la ladmanĝa produktado de tiu fabriko daŭre disvolviĝos. La fabrikestro jam veturis al Beijing por mendi aŭtomatan maŝinaron por produktado de ladskatoloj, kaj nova laborejo estas en konstruado.




Dongfanghong-strato de Ningbo

Rapide progresis ankaŭ la tekstila kaj malpeza industrioj de Ningbo. Ili liveras al la popolo ĉiam pli multajn specojn de varoj. Iom post iom disvolviĝas ankaŭ la industrioj de maŝinfabrikado, kemio, metalurgio, elektroniko, konstrua materialo k.a. Ekzemple, en la unuaj jaroj post la Liberiĝo en Ningbo estis motora fabriko formita el 11 unuigitaj malgrandaj feraĵaj metiejoj. Nun ĝi jam povas produkti dizelojn de pluraj tipoj bezonatajn de fiŝipoj kaj traktoroj produktitaj de Ningbo mem. La 500-kilovattaj generatoroj produktitaj de tiu fabriko kaj la fabrikoj de elektra motoro kaj ŝaltilo vendiĝas tra la tuta lando. Hidrometroj kaj olemetroj produktitaj de Ningbo estis vaste uzataj en la olekampoj de

Daqing kaj oni alte taksis ilian kvaliton. En la lastaj jaroj la novaj elektronikaj industrioj de Ningbo sukcesis produkti kardiograman oscilografon, stereo-fluoreskopon kaj elektronikokomunikan ekipaĵon de la unua surtera akcepta stacio por sputniko. Nun la specoj de produktadoj de Ningbo superis 1,700 kaj 80 el ili estas eksportataj alilanden. La totala produktovalorado de la urbo en 1979 superis 1.2 miliardojn da juanoj, kio estas tridekelk-oblo de tiu de 1949 kaj tri-oblo de tiu de la tuta provinco en unu jaro de la komenca periodo post la Liberiĝo.

En la lastaj jaroj, la ŝtato plenumis en Ningbo plurajn gravajn konstruadojn, ekzemple, la Petrola Rafinejo de Zhejiang po-



La konstruata haveno Beilun

kun plankareo de 8,800 kvadrataj metroj. Ĝi havas 4 halojn, kiuj povas akcepti samtempe 3,000 pasaĝerojn. En la domo troviĝas ĉambroj por honoraj gastoj kaj korto dekoraciita per arta monteto, baseno kaj verdaĵoj.

Samtempe kun reformado al la malnova haveno, oni pene konstruas du novajn havenojn. 40 km. oriente for de la urboparto estas nova haveno Beilun. Ĝi havas vastan areon kaj profundan navigvojon kaj krome havas insulon antaŭ si kiel ŝirmilon. Nun oni konstruas tie modernan erco-dokon povantan ĉiujare transigi 20 milionojn da tunoj. La haveno portos sur sin la taskon transporti ercon bezonatan de la Baoshan-a Ĝenerala Uzino en Shanghai kiu produktos ĉiujare 5 milionojn da tunoj da ŝtalo. Por nia lando estas la unua fojo konstrui tiel grandan havenon. Mi venis al la konstruejo kaj vidis, ke 1-kilometra varfo jam formiĝis en la maro. Kajo por 100,000-tonela ŝipo kaj kajo de du ankrejoj por 25,000-tonela ŝipo kaj tobogana koridoro estas en konstruado. La konstruantoj decidis fini la konstruadon en la dua duono de 1981.

En Zhenhai ĉe la enfluejo de Yongjiang-rivero, kiu distancas 6 marmejlojn de la haveno Beilun, oni konstruis meĥanizan karban dokon povantan transigi ĉiujare 2.7 milionojn da tunoj da karbo. Nun fervoja branĉo jam etendiĝis al la doko. Cetere estas decidite konstrui ponton 750-metran, sub kiu povas trapasi 5,000-tonelaj ŝipoj. La ponto interligos Zhenhai kaj Beilun.

vanta rafini ĉiujare 2.5 milionojn da tunoj da nafto, du kajoj por 25,000-tonela cisternoŝipo, elektrejo ekipita per du 125,000-kilovattaj turbinaj generatoroj kun interne duobla akvo-malvarmiga sistemo.

Draste ŝanĝiĝis ankaŭ la haveno de Ningbo. La haveno havas longan historion. En 1842 Ningbo estis perforte malfermita al fremdlandaj komercistoj laŭ la Ĉina-Brita Nanjing-a Traktato. Pro la prirabado de imperiistoj kaj la senzorgeco de la reakcia registaro de Kuomintang, la haveno grave kadukiĝis kaj en 1949 al la haveno restis nur unu uzebla kajo kaj kelkaj kadukaj ŝipoj.

Post la Liberiĝo la popola registaro aranĝis plurfojan dragon

kaj larĝigon al la naviglinio longa je 25 kilometroj, riparis kaj konstruis sume 13 kajojn, fondis fabrikon de havenaj maŝinoj, ekipis la havenon per pli ol 200 ŝarĝatoroj kaj transportiloj. Post 1958 kiam la fervojo atingis la urbon, Ningbo fariĝis pli oportuna por vara kaj persona trafikado, kaj ankaŭ tre grava transigejo de surmara transportado de la orienta parto de la provinco Zhejiang.

Ningbo havas 9 navigliniojn ligantajn ĝin kun la apudmaraj urboj kaj insuloj, kaj ĉiujare pli ol miliono da pasaĝeroj ĝin eniras aŭ eliras el ĝi. Antaŭ la Liberiĝo la pasaĝeroj devis atendi surŝipiĝon subĉiele sur la apudbordaj stratoj. Nun tie aperis granda domo por pasaĝeroj



Maijishan-monto

de BOHONG

EN la gubernio Tianshui de orienta Gansu-provinco sin trovas kruta ruĝbruna monto alta je pli ol 140 metroj. Sur ĝiaj orienta kaj okcidenta rokmuroj estas multaj grandaj kavernoj kaj etaj niĉoj kiel ĉeloj de abelujo, ĉie interkruciĝas ŝtuparoj kaj surmuraj vojoj. Ĉar la formo de la monto similas al tritika stako, tial de la antikveco oni nomas ĝin Maijishan (Mai signifas tritikon, ĵi — stakadon, shan — monton). Antaŭ pli ol 1,000 jaroj, ĝi jam ĝuis la renomon de trezorejo de orienta skulpturo.

Maijishan-monto formiĝas el terciara ruĝa sabloŝtona formacio kaj preterciara metamorfa formacio. Tial ĝia strukturo

estas ne tiel kompakta kaj oni povas facile fari sur ĝi kavernojn. En la 9-a jarcento a. K. la praavoj de Imperiestro la Unua de Qin-dinastio ricevis feŭdon en Tianshui pro bona plenumo de ĉevalo-bredado por la Reĝo Xiaowang de Zhou-dinastio kaj starigis tie la Regnon Qin. En la okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 8 p.K.), Tianshui fariĝis grava trapasejo sur la silka vojo liganta Ĉinion kaj la Centran Azion kaj Eŭropon. Ĝuste en la unua jarcento p. K. budhismo kondukigis de Hindio en Ĉinion laŭ la silka vojo. Maijishan-monto situas ĝuste sur la vojo trairata de la budhismaj misiistoj. Sed, laŭ la tiama leĝo, la feŭda reĝimo de la

orienta Han-dinastio (25-220 p.K.) ne permesis ke la ĉinoj fariĝu bonzoj. Tial Maijishan-monto fariĝis loko someruma por la parencoj de la imperiestro kaj nobeloj pro siaj bela pejzaĝo kaj agrabla klimato. En la lastaj jaroj de Han-dinastio la centra ŝtato disfalis, de tiam, dum pli ol 300 jaroj, la ĉina socio estis en milita ĥaoso kaj tumultado. La malstabila kaj mizera vivo kreis favorajn kondiĉojn por la budhismo predikanta la transmondan feliĉon de homoj. Ankaŭ la feŭdaj regantoj multe kuraĝigis la budhismon. En la periodo de la 16 Regnoj (317-420 p. K.), la ses sinsekve stariĝitaj etaj regnoj en la provinco Gansu konkure kultis la budhismon kaj kuraĝigis budhisman aktivadon. Oni konstruis templojn kaj kavernojn sur ĉiuj famaj montoj kaj en ĉiuj vidindaj lokoj. Tiam la budhisma ŝtonkaverna arto sin trovis en sia plej granda prospero. Ĝuste en tiu tempo Maijishan-monto fariĝis budhisma sanktejo. La skulptado de budhaj statuoj sur ĝi komenciĝis en la Posta Qin-dinastio (384-417 p. K.) kaj la postaj regnoj faris plian konstruadon, iuj regantoj konstruigis grandan kavernon eĉ per la riĉaĵoj de la tuta lando, ankaŭ ordinaraĵoj popolanoj kaj malriĉaj virinoj kontribuis sian monon akumulitan dum la tuta vivo por renovigi unu bodisatvon. En la 8-a jarcento okazis

granda tertremo en la nordokcidenta regiono, ankaŭ disfalo okazis al Maijishan-monto, preskaŭ disfalis ĉiuj kavernoj en ĝia meza parto. La tuta kavernaro fendigis en du partojn orientan kaj okcidentan. Depost tiu tempo oni faris al ĝi nur ne-grandan riparon. Nun 51 kavernoj estas sur la orienta rokmuro de la monto kaj 143 sur la okcidenta. En tiuj kavernoj konserviĝas pli ol 7,000 argilaj kaj ŝtonaj statuoj kaj murpentraĵoj de pli ol 1,000 kvadrataj metroj faritaj en la periodo de la fino de la 4-a ĝis la komenco de la 19-a jarcento.

En tiu granda muzeo kun budhismaj statuoj, ĉu la majestaj bonkoraj budhoj aŭ afablaj bodisatvoj, piaj seriozaj budhismaj kredantoj aŭ dignoplenaj ĉielaj generaloj ĉiuj estas vivoplenaj. Ekzemple, en la 127-a kaverno serva bodisatvo montris al la budho komplezemon kaj ĝojon, en la 121-a la disĉiplo de budho ameme flustras kun bodisatvo, kio montris deziron kaj prikantadon de la antikvaj metiistoj pri la bela vivo. Kiam ni eniris en la 44-an kavernon, ni vidis sidantan budhon vere admirindan. Kun levita dekstra mano, duonfermitaj okuloj kaj iom malfermitaj buŝanguloj, sur kiuj videbliĝas rideto el la koro, la budho kvazaŭ benas la vizitantojn aŭ estas en meditado. Starante antaŭ li soleca animo kvazaŭ trovas sian karulon kaj deprimita homo kvazaŭ retrovas sian esperon.

Por esprimi sian piecon, iuj monoferantaj budhismaj kredantoj petis metiistojn, skulpti iliajn figurojn en tiuj kavernoj. Dank' al tio hodiaŭ ni povas vidi figurojn de antikvuloj. Ekzemple, en la 123-a kaverno troviĝas statuoj de paro da

gejunuloj, ili eble estis gefiloj de tiutempa ŝjanbej-nacieca nobelo. Tio ebligis al ni vidi vestaĵojn de ŝjanbej-naciecaj gejunuloj antaŭ 1,400 jaroj. En la 165-a kaverno estas statuo de budhisma kredantino de Song-dinastio (960-1279 p. K.), kiu estas eksterordinara tipo el la statuoj de Maijishan-monto. Ŝi estas iom pli alta ol efektiva virino kun svelta staturo en elegantaj sed modestaj vestaĵoj, kaj la brovoj kaj okulanguloj estas levitaj iom pli supren. Kun pugnigita mano ĉe la brusto, ŝi ŝajne volas plendi pri siaj maljustaĵoj kaj doloroj, aŭ adiaŭi la homan mondon pro sia deprimiĝo pri la sorto. Ŝia viveca figuro kredigis nin, ke ŝi

estas neniu alia ol la efektiva figuro de la kredantino, kiu kontribuis la monon por fosi la kavernon kaj skulpti la statuojn. Kiu estas ŝi kaj kion ŝi spertis dum sia tuta vivo? Tion ni neniel povas scii. Tamen ŝia kortuŝa figuro prezentas ĉinajn virinojn kun distingiga individueco sub la feŭda reĝimo.

Por protekti tiun antikvan kulturan artaĵon, nun oni faras grandegan firmigan konstruon al la Maijishan-monta ŝtonkavernaro. Ĉar tie estas agrabla klimato kaj prospere kreskas arbaro, la ŝtato plie konstruigos ĝin en naturan parkon por akcepti enlandajn kaj fremdlandajn turistojn.

Statuo de Ĉiela Generalo de Song-dinastio




Statuo de budhisma kredantino de Song-dinastio (960-1279 p.K.)




“LAZURA JADA MARO”

LA granda jada skulptaĵo “Lazura Jada Maro” estis farita, en la pasinta jaro, de laboristoj de la Beijing-a Jadaĵa Fabriko. Ĝi estas 140 kilogramojn peza, 1.01 metrojn longa, 0.78 metron larĝa kaj 0.31 metron alta. Ĝi estas tre rara en la lastaj cent jaroj pro sia grandeco, bona kvalito kaj eminenta gravura arto, kaj laŭdata kiel arta trezoro.

Utiligante la naturan formon de la materialo oni faris el ĝi vazon, sur kies ekstera muro estis faritaj reliefoj “La Ok Feoj Transiras la Maron”. La feoj en diversaj pozoj estas delikate skulptitaj. Inter ili iu rajdas sur azeno, alia sur drako, tria staras sur testudo, ĉiu montras sian talenton kun magia objekto en la mano. Sub la piedoj de la feoj estas onda maro, kaj en la ondoj naĝas diversspecaj mons-



“Lazura Jada Maro”



Detalo de “Lazura Jada Maro”

traĵ bestoj. Super la maro estas skulptitaj apenaŭ videblaj nuboj, gruoj kaj montoj en malsamaj planoj, kiuj estas bonorde aranĝitaj. Interne de la vazo estas skulptita giganta naĝanta drako. La tuta metiartaĵo prezentas majeston kaj imponecon.

Por kolektive plenumi la taskon, estis starigita desegna kaj produkta grupo, kaj la kreado de tiu metiartaĵo estis komencita en la jaro 1978. La juna desegnisto Lu Kun prenis sur sin la ĉefan desegnan laboron. Ĉerpinte la superaĵojn el la diversaj projektoj, li desegnis skizon kun relative kompleta strukturo kaj brila aranĝo. Dum la skulptado la fama veterana metiartisto Wang Shusen ĉiam laboris kune kun grupanoj, donante al ili zorgajn konsilojn. Dank’ al diligenta laborado de la pli ol 40 homoj kaj aplikado de novaj teknologio kaj rimedoj, la metiartaĵo estis sukcese kompletigita la 16-an de aŭgusto, 1979.

La Beijing-a Lignogravuraĵa Fabriko faris por ĝi lignan soklon, kiu aldonis al ĝi plian ĉarmon.

Kunlaboru!

TRADUKO aŭ alimani-eraj bonvolaj utiligoj de materialoj en nia gazeto estas permesataj kaj dezirataj. Ni petas nur, ke oni notu la fonton kaj sendu al ni 3 ekzemplerojn de la gazeto aŭ alia presaĵo, en kiu ĉerpaĵo aŭ

tradukaĵo el nia gazeto estas aperigita, kaj fotojn pri ekspozicioj en kiuj niaj eldonaĵoj estis montritaj. Per tio vi helpos ne nur nian gazeton, sed ankaŭ la Esperantomovadon en Ĉinio.

LA RED.

HANGZHOU EKSPORTIS TEKNOLOGION AL FRG

Laŭ interkonsento subskribita de la Ĉina Eksporta Kompanio de Ekipaĵoj kaj Linde-kompanio de la Federacia Respubliko Germanio en julio de 1979, la Hangzhou-a Fabriko de Oksigenaj Maŝinoj vendis teknologian materialon pri pregmaŝinoj kaj pregmuldiloj uzataj por produkti naĝilformajn varminterŝanĝilojn, kvar specialajn maŝinojn kaj ses kompletojn da pregmuldiloj, kaj krome ĝi liverados akcesorajn partojn de la venditaj ekipaĵoj dum la dek venontaj jaroj. Antaŭ nelonge, la Hangzhou-a Fabriko de Oksigenaj Maŝinoj jam liveris la unuan parton de la teknologia materialo laŭ la interkonsento, kaj ĝi ankaŭ sendos specialistojn al la germana kompanio por instalado kaj provfunkciigo de la maŝinoj.

RAPIDA OKULFUNDA FLUORESKA FOTILO

La unua rapida okulfunda fluoreska fotilo de Ĉinio estas sukcese farita de la 92-a Hospitalo de ĈPLA en kunlaboro kun iu fabriko.

Tiu fotilo elektronika estas facile manipulebla kaj povas fari 2-8 fotojn en ĉiu sekundo. Praktika uzado pruvis, ke ĝi bone funkcias kaj oni povas ĝin uzi por ĝuste diagnozi okulfundajn malsanojn.



GRANDA KARBOMINEJO FINKONSTRUITA

En novembro de 1979, granda moderna Karbominejo de Sangshuping en Shaanxi (Ŝenhi)-provinco estis finkonstruita kaj komencis produktadon.

Tiu karbominejo estas projektita kaj konstruita de ĉinaj pro-

praj teknikistoj kaj laboristoj kaj ankaŭ ĝiaj ekipaĵoj estas fabrikitaj kaj instalitaj de ĉinoj. Tiu minejo kun relative alta nivelo de meĥanizo kaj aŭtomatigo povas produkti ĉiujare 3,000,000 tunojn da karbo. Ĝiaj maŝinaroj en kaj ekster la ŝaktoj estas regataj per elektronika aŭtomata sistemo. La finkonstruo de tiu karbominejo ludos gravan rolon en ŝanĝo de la karboindustria dispozicio kaj akcelo de la disvolviĝo de industria kaj agrikultura produktado en nordokcidenta Ĉinio.

NOVAJ LOĜDOMOJ EN CHONGQING, LANZHOU KAJ ANSHAN

En 1979, Chongqing (Ĉongking) konstruis loĝdomojn kun plankareo de 505,000 kvadrataj metroj kaj pli ol 10,000 familioj enloĝiĝis en la novaj domoj.

En 1979, la urbo Lanzhou (Langŝou) finkonstruis novajn loĝdomojn kun totala plankareo de 500,000 kvadrataj metroj, kaj tiu cifero estas la plej granda en la pasintaj 30 jaroj. La nove

konstruitaj domoj estas plejparte 4-6-etaĝaj, kiuj enhavas krom oportunaj apartamentoj ankaŭ vendejojn, lernejojn kaj aliajn necesajn instituciojn.

De januaro ĝis oktobro de 1979, la Anshan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio konstruis loĝdomojn kun plankareo de 280,000 kvadrataj metroj por pli ol 8,000 familioj de siaj laboristoj kaj oficistoj.

Novaj loĝdomoj en Beijing



960,000 JUNULOJ DE BEIJING, TIANJIN KAJ SHANGHAI RICEVIS LABORPOSTENOJN


En la jaro 1979, 960,000 junuloj de la urboj Beijing (Pekino), Tianjin (Tiangin) kaj Shanghai (Ŝanhajo) ricevis laborpostenojn.

La kvartaloj kaj strataj organizoj de Beijing fondis grandan nombron da kolektivaj entreprenoj de malpeza industrio, komerco, transportado, konstruado, servo kaj metioj, kiuj havigis profesian laboron al 80% de la senlaboraj junuloj.

Pli ol 90% de tiaj junuloj de Tianjin jam ricevis laborpostenojn en kolektivaj komercaj, servaj kaj produktaj entreprenoj.

En la unuaj dek monatoj de 1979, ĉ. 400,000 junuloj de Shanghai ricevis laborpostenojn, kaj tiu nombro egalas al la totala nombro de la nove instalitaj profesiuloj de tiu urbo en 1977 kaj 1978.

Junulinoj de Chongwenmen-kvartalo de Beijing, kiuj atendas profesian okupon, estas organizitaj por trikado.



Kolektiva fabriko de Guling-kvartalo de Shanghai akceptis junulojn, kiuj atendas profesian okupon, kiel siajn membrojn.

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

Pekina Tempo	GMT	Al Regionoj	Ondoj (m)	kHz
4:00-4:30	20:00-20:30	Eŭropo	43.7 31.9	6860 9380
19:00-19:30	11:00-11:30	Japanio, Koreio	41 30.4	7315 9860
21:00-21:30	13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.6 19.8	11685 15145

GRANDA HIDRO- ELEKTREJO SUR HUANGHE—RIVERO

En la supra baseno de Huanghe-rivero (Flava Rivero) oni konstruas Longyangxia-hidroelektron kun kapacito de 1,600,000 kilovattoj, kiu estas iom malpli granda ol la Hidroelektron de Gezhouba. Ĝi estas la dua granda hidroelektron konstruata en nia lando. La hidroelektron estas konsistiga parto de la longperioda plano por ekspluatado de la akva riĉfonto de tiu rivero.

Antaŭ nelonge oni konstruis tie tunelon kun longeco de 661 metroj, kiu povas tralasi pli ol 3,100 kubmetrojn da akvo en ĉiu sekundo kaj garantii sekuran konstruadon de la baraĵo. Post la finkonstruo de la baraĵo, ĝi estos uzata por tralasi akvon el la akvokonservejo.

La baraĵo de tiu hidroelektron altas je 172 metroj kaj la akvokonservejo povos enteni 24,700,000,000 kubmetrojn da akvo kaj reguligi la akvonivelon de la akvokonservejoj konstruitaj kaj konstruotaj en la malsupra baseno.



SUR LA ARTA SCENEJO DE BEIJING


16 URBOJ ESTAS DIFINITAJ KIEL ĈEFAJ
LOKOJ DE PIEDPILKADO DE ĈINIO

Por rapide altigi la teknikan nivelon de piedpilkado de nia lando, la Sporta Komisiono de Ĉinio lastatempe decidis fari Beijing, Tianjin (Tiangin), Shanghai (Ŝanhajo), Shenyang (Ŝenjang), Luda (Ljuda), Guangzhou (Kantono), Wuhan (Vuhan), Changchun, Chongqing (Ĉongking), Nanjing (Nankino) kaj aliajn 6 urbojn ĉefaj lokoj por piedpilkado, samtempe disvolvi en la tuta lando piedpilkadon inter la laboristoj, oficistoj, soldatoj kaj knaboj kaj starigi piedpilkajn teamojn.

Lastatempe sur la arta scenejo de Beijing (Pekino) prezentiĝas nombro da novaj programeroj inkluzive de moderna dramo "N. Bethune" ludita de la Beijing-a Drama Trupo Zhanyou, kiu priktantas la internaciisman batalanton, kanadan doktoron N. Bethune, kiu venis al Ĉinio por helpi la ĉinan popolon en ĝia Kontraŭjapana Rezistmilito, na-

cia baleto el mito "Banpingshan-monto" ludita de la Shanghai-a Opera kaj Baleta Trupo, kiu prikskribas knabinon Shiping, kiu brave batalas kontraŭ perfortaĵoj por realigi kunestiĝon kun siaj karuloj, "Printempa Melodio" ludita de la Yunnan-opera Trupo kaj kantoj kaj dancoj prezentitaj de la Postlabora Kanta kaj Danca Trupo de Hebeiprovinco.

Rizo-pista danco en la baleto "Banpingshan-monto"

LA TUTLANDA EKSPOZICIO DE
SCIENCO-ĜENERALIGAJ
BELARTAĴOJ EN BEIJING


La nomita ekspozicio kune aranĝita de la Ĉina Asocio de Scienco-ĝeneraliga Verkado kaj la Ĉina Artista Asocio okazis en Beijing en novembro de 1979. Per diversaj artaj ekspoziciitaĵoj

oni vivece kaj figure konigis sciencajn kaj teknikajn sciojn pri agrikulturo, industrio, naci-defendo, medicino k. a. La ekspozicio estis laŭdata kaj alte takсата de la vizitantoj.

La Tutlanda Ekspozicio de Scienco-ĝeneraligaj Belartaĵoj

SIMPOZIO PRI ĈINA
MODERNA LITERATURO
KAJ ARTO
OKAZIS EN CHANG-
CHUN

Lastatempe en Changchun (Ĉangĉun) okazis la nomita simpozio, kiun ĉeestis pli ol 180 literaturaj studantoj, redaktoroj pri literaturo kaj arto kaj edukaj laborantoj el 24 provincoj kaj municipoj de la lando. La kunvenantoj oficiale fondis Asocion por Studo de la Ĉina Moderna Literaturo, aprobis ĝian statuton kaj elektis literaturan komentiston kaj vicprezidanton de la Ĉina Verkista Asocio Feng Mu kiel ĝian prezidanton.



Ekspozicio de Fotoj pri la Arto de Dunhuang



ĈINIO MALFERMIS OK MONTPINTOJN AL FREMDLANDAJ MONTOGRIMPISTOJ

La koncerna departemento de Ĉinio decidis malfermi, ekde la jaro 1980, ok montpintojn al pagantaj fremdlandaj montogrimpistoj. La ok montpintoj estas Qomolangma (ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Nepalo), Xixabangma (en Tibeto), Muztagata, Kongur, Kongurtiubie kaj Bogda (en Xinjiang), Gongga (en Sichuan) kaj A'nyemaqen (en Qinghai).

EKSPOZICIO DE FOTOJ PRI LA ARTO DE DUNHUANG EN BEIJING

La nomita ekspozicio okazis lastatempe en la Ĉina Belarta Domo. Estas unuafoje por Ĉinio sisteme prezenti per koloraj fotoj la arton de Dunhuang, fama arta trezorejo de la mondo. La ekspoziciitaj pli ol 200 koloraj fotoj efektive montris la arton de la ĉina antikva ŝtonkavernaro

rilate freskojn, kolorajn skulptaĵojn kaj arkitekturon. La fotoj estis faritaj sub natura reflektita lumo. Per tia metodo la fotistoj perfekte reaperigis sur la nunaj fotoj la artaĵojn kreitajn siatempe de la artistoj sub la natura lumado.

(Daŭrigo de p. 38)

“Kia kolerigaĵo!” veis Xinhua.

“Estas pli bone rompi. Ne valoras facilanima virino,” diris la kuzino kun malestimo.

“Kio! Guoming jam havas 29 jarojn kaj estas multe pli malfacile por li refianĉiĝi.”

“Li estas bona homo kaj certe akiros la amon de knabino.”

“Eble jes.”

“Ĉu vi amas lin?”

“...”

“Se li vere estas tiel bona, kiel vi asertis, kial vi ne . . .”

“Kio?”

“Kial vi ne fianĉiniĝos al li?”

“Knabinaĉo!”

“Ni ambaŭ edziniĝos al la fratoj . . .”

“Sensencaĵo!”

“Mi svatos . . .”

“Bubinaĉo!”

“Tion mi diros al Guoliang . . .”


Venteto blovis el sub la litkovrilo. Xinhua frapadis la kuzinon ĉiufoje kun insulto: “Ci, ci, ci, . . .”


Sed la kuzino ridklukadis, insistante: “Tion mi diros certe, certe, certe . . .”

(Daŭrigota)

Ĉiu persono povas ĝin fari kaj ĝin vidi, sed neniu povas ĝin vidigi al la aliaj. Kio ĝi estas?

— Ĝi estas la sonĝo.







Alpoj

de Giovanni Roattino (Italia)

FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ



Fresko sur la plafono
de la Pavilono Qi'oge



La statuo de bodisatvo riparita de
Ming-dinastio (1368-1644) en la
Pavilono Qi'oge



Ŝtona
Kavernaro
Maijishan

Statuoj de disĉiplo de budho kaj
bodisatvo de la Okcidenta Wei-
dinastio (398-534 p.K.) en la kaver-
no n-ro 121

Poŝtmarkoj de la nova Ĉinio

Tiu ĉi serio da poŝtmarkoj "Kamelioj de Yunnan" surhavas bildojn de kamelioj de propraj specoj de Ĉinio.



Servknabo en kostumo de Xianbei-nacieco



Statuo de bodisatvo en la kaverno n-ro 74. Ĝi estas frutempa verko en la kavernaro, sur kiu evidente montriĝas influo de eksferlanda arto.





3448

